**Este arquivo contém traduções para o Esperanto, feitas por Affonso Soares, de 69 textos colhidos nas seguintes 4 obras de Emmanuel, ditadas ao médium Francisco Cândido Xavier:**

***Vojo, Vero kaj Vivo* (Caminho, Verdade e Vida)**

***Pano Nia* (Pão Nosso)**

***Vinberejo el Lumo* (Vinha de Luz)**

***Viva Fonto* (Fonte Viva)**

**Todas apareceram, ao longo dos anos, nas páginas de Reformador, tendo agora recebido nova revisão de Affonso Soares.**

**Poderão ser utilizadas na página do Laborgrupo Esperanto, no Facebook, na ainda projetada página da FEB exclusivamente em Esperanto, ou em qualquer outro espaço a critério da FEB.**

## Sur la ŝtonplena vojo

"Mi ne foriros de vi kaj ne forlasos vin." -- *Paŭlo.*
( HEBREOJ, 13 : 5. )

La parolo de la Sinjoro aludas ne nur la subtenadon de la fizika vivo ĉe la ŝtonplena suprenirejo al la spirita altiĝo.

Multe pli ol la fizikan, ni bezonas la panon spiritan.

Se la ĉeloj de la fiziologia kampo suferas malsaton kaj postulas ordinaran supon, la bezonoj kaj deziroj, impulsoj kaj emocioj de la animo estigas kelkfoje senmezurajn afliktojn, postulante pli riĉan nutron spiritan.

Estas momentoj de profunda laceco ĉe la plej internaj el niaj rezervoj.

La energio ŝajnas elĉerpita kaj la espero retiriĝas en apation. Ombro ekestas en nia interno, kvazaŭ densa nokto nin envolvus.

Kaj simile al la Naturo sub la nokta mantelo, malgraŭ ke ni disponas fontojn de kompreno kaj florojn de bonvolemo en la vasta teritorio de la animinterna lando, ĉio restas vualita per la nebulego de nia maltrankvilo.

Sed eĉ tiam la Ĉiokompatema tute ne forlasas nin en la mallumo de niaj ŝanceliĝoj kaj elreviĝoj. Kiel Li lumigas la brilegajn stelojn en la altaĵo, montrante la stelplenajn irejojn de l' firmamento al la devojiĝintoj sur tiu ĉi mondo, tiel same Li ekflamigas, sur la ĉielo de niaj idealoj, novajn konvinkojn kaj pli noblajn aspirojn, por ke la spirito ne perdiĝu en sia irado al la supera vivo.

"Mi ne foriros de vi kaj ne forlasos vin" -- promesas la Dia Boneco.

Nek soleco, nek forlasiteco.

La Ĉiela Providenco senĉese prigardas . . .

Ni do konservu la konsolan certecon, ke ĉian ŝtormon sekvas trankvila atmosfero kaj ke post nokto nepre venas tagiĝo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier -- El la libro "Viva Fonto", ĉapitro 41.)**

## Kiraso de karitato

"Ni estu sobraj, surmetante la kirason de fido kaj amo." -- *Paŭlo.* ( I. TESALONIKANOJ, 5 : 8. )

Paŭlo estis treege saĝa kiam li konsilis al la laborantoj de la lumo surmeti la kirason de karitato.

Por atingi la dezirindan sukceson en la misio de amo, kiun ni intencas plenumi kun la Kristo, antaŭ ĉio nepre necesas antaŭgardi la koron.

Kaj se ni ne ŝirmos la fonton de la sentoj en la vibroj de fervora amo, inspirate de nobla kompreneno en la rondoj de edifa spertiĝado, en kiuj ni moviĝadas surtere, tiam estos al ni tre malfacile venki ĉe la tasko, kiun la Sinjoro konfidas al ni.

La konstanta malpacienco kontraŭ nesciado prokrastas la bonojn de la bonfara instruado.

La troa indigno kontraŭ pekemo ekstermas la malfortikajn ĝermojn de la virto.

La ofta kolero sur la batalkampo de la vivo povas multobligi la malamikojn sen ia utilo por la laboro, al kiu ni nin dediĉas.

La ekscesa severeco kontraŭ tiuj personoj ankoraŭ fremdaj al la avantaĝoj de disciplino kuntrenas malbonefikajn rezultojn pro la manko de edukiteco en la medio kie ĝi manifestiĝas.

Komprenante, do, ke ni, kristanoj, troviĝas sur vera batalkampo, kie kelkfoje nin kontraŭstaras sugestoj por senbrida malpacienco, maloportuna indigno, senprava kolero aŭ maledifa severeco, tial la apostolo al la nacianoj preskribis al ni la kirason de karitato kiel defendan gardostaranton de la centraj organoj de la vivomanifestiĝo.

Nepre necesas armi la koron per senfina frata komprenemo por plenumo de la laboro, al kiu ni devontigis nin.

La konvinkiteco kaj la entuziasmo de la fido sufiĉas por inde komenci la servadon, sed por ĝin daŭrigi kaj sukcese elfini neniu povos malhavi la paciencan, indulgeman kaj nevenkeblan karitaton.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier -- El la libro "Viva Fonto", ĉapitro 98.)**

# “Kion mi faru?”

“Kion mi faru?” -- *Paŭlo.* ( LA AGOJ, 22 : 10. )

Miloj da kamaradoj alproksimiĝas al la Evangelio por la malnova kulto al la malpenemo.

Kiel mi regos? - unuj demandas.

Kiel mi ripozos? - demandas aliaj.

Kaj multiĝas la petoj, strangaj, riproĉindaj, nekompreneblaj . . .

Estas tiuj petantaj pri trivialaj refreŝigoj de la karno ; tiuj plendantaj pri nemeritaj korinklinoj ; tiuj sopirantaj al nekonfeseblaj negocoj ; kaj tiuj postulantaj rimedojn por malhelpi la konstruadon de paco kaj bono.

La demando de la apostolo Paŭlo, ĝuste en la momento kiam li ricevas la gracon de la Dia Ĉeesto, staras kiel modelo por ĉiuj lernantoj kaj sekvantoj de la Bona Novaĵo.

La granda laboristo de la Revelacio ne petas translokiĝon al la Ĉielo, nek dekliniĝas al sugestoj pri favorado al sia intima rondo. Li ne petegas pri formeto de respondecoj, nek evitas la devon bataladi.

- Kion mi faru? - li demandas Jesuon, komprenante necesan sia penado.

Kaj la Majstro ordonas al li leviĝi por la semado de lumo kaj amo per la ofero de si mem.

Se vi estis vokita al la fido, ne turnu vin al la Dia Mentoro kun petegoj pri privilegioj kaj favoroj, kiuj vin restigus ĉe spirita stagnado.

Ni serĉu kun la Sinjoro la servadon, kiun al ni difinas lia Senlima Bonkoreco, kaj ni tiel venke marŝos al la sublima renoviĝo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier -- El la libro “Viva Fonto”, ĉapitro 112.)**

## Ni posedas, kion ni donas

"Pli feliĉe estas doni ol ricevi." -- *Paŭlo* ( LA AGOJ, 20 : 35. )

Kiam oni mencias tiun evangelian lokon, kiu rigardas la agon doni kiel pli grandan feliĉon, ol la agon ricevi, preskaŭ ĉiuj lernantoj de la Bona Novaĵo pensas pri la vorto "mono".

Sendube, koncerne la materiajn havaĵojn, estas ĉiam pli ĝoje helpi ol ricevi helpon, sed oni nepre ne forgesu la spiritajn havaĵojn, kiuj, radiate de ni mem, plialtigas la kvaliton kaj la intensecon de la feliĉo sur nia vojo.

Kiu donas, tiu rikoltas la ĝojon vidi la multobligon de la dono.

Proponante ĝentilecon, vi instigos al plantado de frateco.

Disdonante la benon de l' pardono, vi fortikigos la justecon.

Donacante bonkorecon, vi kreskigos la konfidon.

Donante vian bonan ekzemplon, vi certigos la noblecon de karaktero.

La Kreinto havigas al la Kreitaro la rimedojn de Sia Kreaĵo, por ke ĉi tiuj, senĉese transdonataj, multobliĝu en la Senfino.

La Ĉielo vin helpos laŭ tio, kiel vi helpas sur la Tero.

Ni posedas, kion ni donas.

Vi do ne forgesu, ke vi estas administranto de via nuna ekzistado.

Havigu al via proksimulo ion pli ol vian monon. Donu ankaŭ vian ameman intereson, vian sanon, vian ĝojon kaj vian tempon ; tiel vi vere ekposedos la sublimajn donacojn de amo, de ekvilibro, de feliĉo kaj de paco, hodiaŭ kaj morgaŭ, en ĉi tiu mondo kaj en la eterna vivo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier -- El la libro "Viva Fonto", ĉapitro 117.)**

## Kiun vi sekvas?

"Sed vi ne tiel lernis Kriston." -- *Paŭlo* ( EFESANOJ, 4 : 20 )

La homo kompreneble renkontos survoje diversajn sugestojn. Ne nur el la materia sfero venos al li certaj inspiroj, lin emig6antaj al forlaso de la plej noblaj realigoj. Ankaŭ la nevidebla sfero apuda al la rondo de liaj pensoj povas liveri al li certajn perspektivojn nekonformajn al la altaj devoj entenataj en la vivo mem.

En la konsiderado de tiu problemo, la sinceraj disĉiploj komprenas la bezonon centri sian konduton en Jesuo Kristo, kaj la forgeso de tiu imperativo povas estigi la plej grandajn konfuzojn.

La disĉiploj malpli fidelaj al la instruoj de la Majstro kredas, ke ili povas servi al du sinjoro, kaj kelkfoje ili eĉ konsentas la eblecon kontentigi ĉiujn frenezajn impulsojn de la sensoj sen perdo de la anima paco. Sian pravigon ili serĉas en novaj doktrinoj naskitaj de la sciencaj novaĵoj de la jarcento kaj ĉe certaj pseudofilozofoj, trovalorigantaj la instinktojn ; sed veninte al tiu punkto, ili nepre atendu plej grandajn falojn, ĉar la bezono de spirita edifado daŭre restas viva kaj pli kaj pli urĝega. Ili ja povos serĉi apogon ĉe la asertoj de la pretendemaj scienculoj de la mondo, sed ne tiel instruis Jesuo.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" , ĉapitro 159.)**

# En la rilatoj kun la nevidebla mondo

"Kaj li alvokis ilin, kaj parolis al ili parabole : Kiel povas Satano elpeli Satanon?" -- ( Marko, 3 : 23. )

Tiu loko de la Evangelio estas ege klariga por la nuntempaj frat-kunuloj, kiuj en la taskoj de la kristana Spiritismo klopodas helpi malfeliĉajn elkarniĝintojn trovi la ekvilibron sur la elaĉeta vojo.

Neniu atendu tujan sukceson, penante subteni tiujn kiuj devojiĝis senkonsilaj.

Estas neeble malbezoni la kunlaboron de l' tempo, por ke la personoj de la homa tragedio klarigu al si la situacion, kaj kiom ni scias eĉ la apostoloj mem ne sukcesis tuj konvinki la konfuzitajn estulojn pri la reala danĝereco de ilia situacio. Tamen multon povas fari la disĉiplo sur la kampo de tiu priluma agado, se li ne alprenos sterilan sintenadon. Nuntempe kunuloj sindonaj al la servado ankoraŭ estas persekutataj de la malamikoj de la lumo, kiuj imputas al ili malluman kontrakton kun malicaj potencoj. La religia sektemo alnomas ilin partianoj de Satano, trudante al ili torturojn kaj humiligojn.

Sed tiujn samajn akuzojn kaj riproĉojn ĵetis sur la Dian Majstron la tiama organizita pastraro. Kuracante malsanulojn kaj obseditojn regatajn de pereigaj fortoj de la mallumo, Jesuo ricevis la titolon de sorĉisto, filo de Belzebuto. Tio ja estas signifoplena rememorigo, kiu kompreneble tre konsolos la novajn disĉiplojn.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" , ĉapitro 146.)**

# Filoj kaj Servantoj

"Kaj la sklavo ne ĉiam restas en la domo, sed la filo ĉiam restas." -- *Jesuo.* ( JOHANO, 8 : 35.)

Jesuo, en sia ekzemplado, instruis al ni kiel akiri la titolon de filoj de Dio.

La aktiva kaj senĉesa laborado, la seninteresiĝo pri la malsuperaj interesoj de la mondo, la plena submetiĝo al la diaj decidoj ja estis fundamentaj trajtoj de liaj lecionoj sur la Tero.

Multaj homoj, elstaraj pro siaj boneco kaj nobla karaktero, dignaj pastroj kaj kredantoj sinceraj povos esti sindonaj servantoj de la Plej Alta Estulo. Sed la Kristo instigis nin al io pli. Li invitis nin esti filoj, klarigante ke la filoj restas "por ĉiam en la domo".

Kaj la servantoj? Tiuj multfoje spertas ŝanĝojn. Ne ĉiam ili restos ĉe la Patro.

Sed ĉu la Tero ankaŭ ne estas ĉambreto, kvankam modesta, de la domo de Dio? Ĝuste en ĉi tio pulsas la kerno de la leciono.

La Majstro aludis la servantojn kiel personojn kun diversaj propraj interesoj. La filoj tamen havas interesojn komunajn kun la Patro. La unuaj, servante al Dio kaj al si mem, ĉar kiel servantoj ili atendas salajron, povas suferi korpremojn, afliktojn, delirojn kaj turmentajn dolorojn. Sed la filoj estos ĉiam "en la domo", tio estas, ili restos en paco, superaj al la plej akraj cirkonstancoj, ĉar ili rekonas, ke super ĉio ili apartenas al Dio.

EMMANUEL

**(Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo", ĉapitro 125.)**

# Intuicio

"Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo ; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio." – ( II PETRO, 1 : 21. )

Ĉiuj homoj, ĉe la dia tabernaklo de la konscienco, partoprenas en la povo de la intuicio, kaj tiiusence ĉiuj povas, sur la kampo de la spirita plialtiĝo, disvolvi sian kapablecon. Ne estas esence bezonaj la impresaj mediumaj fenomenoj, por ka stariĝu la interŝanĝa movado inter la sferoj videbla kaj nevidebla.

Ĉiu sciado, nobliganta la homan vivon, devenis el la superaj regionoj. Kaj tiuj nobligaj ideoj estiĝis per la volo de nenia homo, ĉar la esence surtera rezonado ĉiam inklinas al la materialeco laŭ sia enradikiĝinta egoismo.

La dia revelacio, signifanta tion plej bonan, kion la Homaro posedas, estas la kunhelpo de la sublima spirita sfero, portata de la kunlaborantoj de Jesuo al la homoj per la ekzemplado, la agoj kaj la paroloj de la justuloj, kiuj per propra penado krevigas la ilin ĉirkaŭantan rondon de vulgaraĵoj kaj tiel fariĝas instrumentoj por necesa renovigo.

La intuicia kapablo estas universalaĵo. Per ĝi la surtera homo ricevas la vibrojn de la plej alta vivo en la formo de kontribuaĵoj religiaj, filozofiaj, artismaj kaj sciencaj, plivastigante siajn kulturajn kaj sentajn atingojn, kaj tiu kunlaborado ĉiam fariĝas ne per la homa volo, sed per dono de Dio.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo", ĉapitro 156.)**

# Reenkarniĝo

"Kaj se via mano aŭ via piedo faligas vin, detranĉu ĝin kaj forjetu ĝin de vi : estas bone por vi eniri en vivon kripla aŭ lama prefere ol, havante du manojn aŭ du piedojn, esti enjetita en la eternan fajron." -- *Jesuo.* (MATEO, 18 : 8 .)

Nur la reenkarniĝo solvas la demandojn pri la esto, la doloro kaj la destino, kaj en multaj okazoj Jesuo parolis al ni pri ĝiaj belaj kaj saĝaj principoj.

Tiu ĉi loko el Mateo estas ege signifoplena.

Nepre necesas konsideri, ke la Majstro sin turnis al stagnanta, preskaŭ morta socio.

En harmonia kolekto de la diaj instruoj, la kristano efektive konas nur unu specon de morto : tiun, kiu trafas la konsciencon pekintan kontraŭ la Leĝo ; kaj la plimulto de la samtempuloj de la Kristo estis personoj sen edifa spirita agado, kun ŝtoniĝinta animo kaj paralizita koro. La esprimo "estas bone por vi eniri en vivon" prezentas fundamentan solvon. Ĉu la tiamaj aŭdantoj ne estis homoj? La Sinjoro tamen aludis la kontinuan ekzistadon, la ĉiaman vivon, dum kiu ĉiu spirito vekiĝos por sia glora destino en la eterneco.

Per la alta simboleco de siaj vortoj, Jesuo prezentas al ni la kaŭzon de la doloraj rezaskiĝoj, kie ni rigardu kriplulojn, blindulojn kaj denaskajn paralizulojn, kiel animojn, kiuj petis tiajn provojn por la refortiĝo kaj la revirtiĝo nepre necesaj al la estonta feliĉo.

La bildo pri la "eterna fajro", enmetita en la evangeliajn tekstojn, estas rimedo tre konforma al la instruo, ĉar tiel longe, ĝis la homo ne decidiĝos vivi kun la Kristo, li al tio estos instigata per milo da malsamaj rimedoj ; se la ribelemo longe daŭros tra sennombraj jarcentoj, la purigaj procedoj same daŭros kiel la materia fajro, kiu ekzistos sur la Tero dum ĝia helpo estos bezona, kiel utilaĵo nepre necesa al la fizika vivo.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo", ĉapitro 108.)**

## Rezigni

"Kaj ĉiu, kiu forlasis domojn aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ patron aŭ patrinon aŭ infanojn aŭ kampojn pro mia nomo, ricevos multoble kaj heredos eternan vivon." -- *Jesuo.* (MATEO, 19 : 29.)

En tiu ĉi paragrafo de la Evangelio laŭ Mateo, la Dia Majstro admonas nin al la devo rezigni la mondajn havaĵojn por atingi la eternan vivon. Estas necese, proklamas la Mesio, forlasi patron kaj patrinon, edzinon kaj fratojn de la mondo. Tamen necesas ankaŭ klarigi kiel rezigni.

Jesuo komprenigas, ke la sukceso apartenos al tiuj, kiuj tion faros pro lia nomo.

Unuavide la dia propono ŝajnas sensencaĵo.

Kiel forgesi la sanktajn devojn de la ekzistado, se la Kristo venis al ni por ilin sanktigi? La senpripensaj disĉiploj en la plej antikva tempo ne sciis kapti la sencon de la teksto. Multenombraj samidealanoj enfermiĝis en la klostro, forgesante superajn kaj neprokrasteblajn devojn.

Sed estas facile konstati kiel la Kristo rezignis.

Al la lin forlasintaj kunuloj li reaperis, glora, ĉe la releviĝo. Malgraŭ la hezitado de la amikoj, li dividas kun ili en la Sankta Manĝejo la eternajn ĝojojn. Al la sendankuloj, kiuj lin krucumis, li postlasas subliman savprogramon per la Evangelio, kaj neniam, eĉ dum minuto, li malzorgis la homojn.

Ni do atente rimarku, kion signifas rezigni pro amo al la Kristo. Ĝi estas perdi la esperojn surterajn kaj havigi al si tiujn de la Ĉielo.

Se la gepatroj ne estas komprenemaj, se la edzino estas maldankema, se la fratoj ŝajnas kruelaj, tiam estas necese rezigni la ĝojon havi ilin pli bonaj aŭ perfektaj kaj ankoraŭ pli forte unuĝi kun ili ĉiuj, por ke ni partoprenu la perfektiĝan laboron kun Jesuo.

Ĉu vi ne trovas komprenenmon en via hejmo? Ĉu amikoj kaj fratoj estas indiferentaj kaj krudaj? Eĉ tiel daŭre restu apud ili, atendante, ĝis pli malfrua tempo, la ĝojon renkonti tiujn perfekte afinantajn al vi. Nur tiel do vi rezignos viajn karulojn, nome, farante al ili ĉiun bonon pro sindono al la Majstro, kaj nur per tiela rezigno vi atingos la eternan vivon.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 154.)**

## Jesuo venis

"... sed sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj." -- *Paŭlo.* (FILIPIANOJ, 2:7.)

Multaj disĉiploj aludas ekstremajn malfacilaĵojn por fari la bonan laboron en la servoj de la evangelia interfratigo, tion atribuante al la bedaŭrinda nesciado, ĉe kiu plezuriĝas grandega procento da teridoj.

Sed tiaj plendoj ne estas justaj.

Por plenumi sian dian mision de amo, Jesuo ne ricevis la rektan kunlaboron de komprenemaj kaj perfektiĝintaj Spiritoj, sed li ja "sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj".

Ni ne povus supreniri al la Savinto, ĝis lia sublima pozicio, sed la Majstro venis al ni, kaj kelkatempe li estingis sian aŭreolon, celante bonfari al ni sen elmontroj sensaciaj.

Ĉi-rilate la ekzemplo de Jesuo proponas ege profundan instruon.

Nenia homo veninta sur la Teron atingis la kulminan altecon de la Kristo, sed li sidiĝis ĉe tablo kun pekuloj, frate alparolis malĉastulinojn kaj faris sian lastan ateston inter rabistoj.

Se via proksimulo ne povas leviĝi al via spirita pozicio, vi tamen povas iri al li por la bona servo de frateco kaj lumigo, sen paradaj elmontroj, kiuj ofendus lian malsuperecon.

Rememoru la ekzemplon de la Dia Majstro.

Por veni al ni, li sin malplenigis, eniris la mondon kiel senlulila infano kaj elplenumis sian gloran laboron kiel krucumita sklavo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Caminho, Verdade e Vida" ( Vojo, Vero kaj Vivo ) -- ĉapitro 8.)**

## Edukado en la Hejmo

“Kaj vi ankaŭ faras tion, kion vi vidis ĉe via patro.” -- *Jesuo.* (JOHANO, 8 : 38.)

Oni nuntempe rekomendas iun edukadon bazitan sur la plena libereco de la homaj instinktoj, kaj iom post iom estas forgesataj la malnovaj instruoj pri la hejma formado de la karakteroj ; sed frue aŭ malfrue la kolektivo estos devigata reĝustigi siajn decidojn.

La patroj devas esti la unuaj mentoroj de la homo. De ilia ama misio kreiĝas la ĝusta medio. Koruptaj medioj signifas malbonajn patrojn ĉe tiuj, kiuj, meze de la kolektiva senzorgeco kaj sub la pezo de longa sinoferado, sukcesas teni la eblan sekurecon kontraŭ la minacanta malordo.

La servado en la hejmo neniam fariĝu valvo por senfrukta ĝuado, ĉar ĝi estas ja agado kaj kunlaborado kun Dio. La viro aŭ la virino, dezirantaj samtempe esti patroj kaj vivi ĝuplenan vivon, fariĝis blindaj kaj finiĝos kun siaj frenezaj klopodoj, laŭ spirita vidpunkto, en la komuna tombo de la senutileco.

Vane ekstaros sociologoj por anstataŭigi la hejman edukadon per konfuzaj surogatoj, venenaj por la animo. Nur spirito kompreninta, ke super ĉio staras la patreco de Dio, sukcesas eskapi el tiu leĝo, laŭ kiu la filoj ĉiam imitos la patrojn, eĉ se ĉi tiuj estas malicaj.

Ni aŭdu la parolon de la Kristo, kaj vi, havantaj filojn sur la Tero, gardu kiel admonon la Majstran aserton.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro “Vojo, Vero kaj Vivo” -- ĉapitro 12.)**

## Verkistoj

“Gardu vin kontraŭ la skribistoj, kiuj amas promedadi en roboj.” -- *Jesuo.* ( MARKO, 12 : 38. )

La monda beletro ĉiam estis plena je “skribistoj, kiuj amas promenadi en roboj”.

Jesuo aludis ne nur la ambiciajn intelektulojn, sed ankaŭ tiujn strangajn verkistojn, kiuj, je preteksto de novaĵoj, venenas la spiritojn per siaj malsanigaj produktoj, devenantaj de la troa deziro je originaleco.

Necesas eviti tiujn detruantojn de la simpla vivo.

La intelekta tokso ordinare ruinigas multe da ekzistadoj.

Ekzistas libroj, havantaj la utilan rolon tenadi la torĉon de la spirita viglado en tiuj animoj, kies karaktero solidiĝis ĉe la plej noblaj idealoj. Ankoraŭ nun, kiam la homo trapasas tumultajn, malfacilajn tempojn, la merkato de la ideoj estas saturita de putraj artikloj, postulante la intervenon de l’ institucioj pri “spirita higieno”.

Ĉu vi povus nutri la korpon per putraj substancoj?

Ankaŭ via animo ne povos sin nutri per malsuperaj idealoj, surbaze de senreligieco, malrespekto, malordo kaj sendisciplino.

Observu la modelojn de la intelekta dekadenco kaj sincere meditu pri la paco, kiun vi intime deziras. Tio estos ja forta helpo por forigo de l’ intelektaj devioj.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro “Vojo, Vero kaj Vivo” -- ĉapitro 28.)**

## La Ora Regulo

“Amu vian vian proksimulon kiel vin mem.” -- *Jesuo.* (MATEO, 22 : 39.)

Sendube, multe da jarcentoj antaŭ la veno de la Kristo, la Ora Regulo jam estis instruata sur la mondo, portata de la senditoj de lia saĝeco kaj korfavoro. Sed necesas klarigi, ke tiu principo estis predikata per pli aŭ malpli da ekzemplado de la predikantoj.

Diradis la grekoj : "Ne faru al la proksimulo, kion vi ne deziras, ke li faru al vi".

Asertadis la persoj : "Faru tiel, kiel vi deziras, ke oni faru al vi".

Predikadis la ĉinoj : "Kion vi ne deziras al vi, tion ne faru al alia".

Rekomendis la efiptoj : "Lasu tiun pasi, kiu faris al aliaj, kion li deziris al si".

Instruadis la hebreoj : "Kion vi ne deziras al vi, tion ne deziru al la proksimulo."

Insistadis la romanoj : "La leĝo enskribita en la homa koro estas, ke oni amu la socianojn kiel sin mem."

En la antikva tempo ĉiuj popoloj ricevis la oran leĝon el la grandanimeco de la Kristo. Sed profetoj, administrantoj, juĝistoj kaj filozofoj agadis kiel instrumentoj pli-malpli agorditaj al la inspirado el la plej altaj regionoj de la spirita vivo. Iliaj figuroj malaperis en la inicejoj aŭ konfuziĝis sur la ekrano de l'tempo, pro la fragmenteco de iliaj atestoj.

Sed kun la Majstro la Ora Regulo estas dia novaĵo, ĉar Jesuo instruis kaj ekzemplis ĝin ne per nekompletaj virtoj, sed en la pleneco de sia laborado, abnegacio kaj amo, en la klara lumo de la publikaj lokoj, montrante sin al la tuta Homaro.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 41.)**

## Negocoj

"Kaj li diris al ili : Kial vi serĉis min? Ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro?" (*) -- (LUKO, 2 : 49.)

La homo de l' mondo estas ĉiam okupita de negocoj rilataj al siaj pasemaj interesoj.

Unuj trapasas la tutan vivon, observante la kurzojn de la borsoj, dum aliaj absorbiĝas en la studado de la merkatoj.

La landoj havas siajn internajn kaj eksternajn negocojn, en kies koncernaj servoj estas uzataj mirindaj kapabloj de la intelekto. Sed malgraŭ sia respektinda trajto, kiam laŭleĝaj, tiuj movadoj estas necertaj kaj pasemaj. La plej fortaj borsoj spertos krizojn ; la monda komerco estas ŝanĝiĝema kaj, iafoje, sendanka.

Tre maloftaj homoj sin dediĉas al siaj eternaj interesoj. La plejmulto ilin memoras tro malfrue, kiam ilia korpo ekmortas, kaj nur tiam ili vekiĝas el la fatala forgeso.

La homa kreito devas tamen rigardi sian propran spiritan lumigon, kiel la plej bonan surteran negocon, ĉar tia operacio signifas la intereson de la Providenco pri ni.

Dio permesis la transakciojn sur la planedo, por ke ni lernu fratecon en la interŝanĝo, kaj Li lasis fariĝi la surterajn negocojn, ke per ili ni instruiĝu pri la plej granda el ĉiuj negocoj. Jen kial la Majstro klare parolas al ni laŭ la notoj de Luko : -- "Ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro?" (*)

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 27.)**

---

(*) La portugala originalo tekstas : -- "Ĉu vi ne sciis, ke mi devas zorgi pri la negocoj de mia Patro?"

Simila demando stariĝis antaŭ la karmemora Prof. Iŝmael Gomes Braga, kiam li tradukis "La Evangelion laŭ Spiritismon", ĉap. XXVIII, 3, VI. Fidele kopiinte la frazon el la esperanta traduko de la Nova Testamento, ni faras nenion alian, ol sekvi liajn spurojn, kaj kun li ni same diras : "La eldono de la Biblio en Esperanto estas tre respektinda kaj la tradukinto ne kuraĝas ŝanĝi konscie ĝian tekston.

**La Trad.**

## Ne kredi

"Sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita." -- *Jesuo.* (MARKO, 16 : 16. )

La nekredantoj estas tiuj, kiuj restas. Por ili, ĉiuj vivoesprimoj reduktiĝas al finhavaj sensaĵoj, perdiĝontaj en la malluman mortabismon.

Kiuj levas sian koron al la plej alta vivo, tiuj estas savitaj. Iliaj labortagoj estas ŝtupoj de senfina lumŝtuparo. Per energia penado kaj peza

lukto, ili preterdistancas siajn similulojn kaj, kvankam konfesante la propran neperfektecon, ili difinas al si la ĉirkaŭan pejzaĝon kaj identigas la evoluirejojn. Plenaj de kuraĝo, ili sentas, ke ili plenumas la malfacilan taskon supreniri la monton de amo kaj saĝo.

Kiuj tamen ne kredas, tiuj malvastigas siajn horizontojn kaj vidas nur per tomboiraj okuloj, inertaj koncerne pripensadon kaj taksadon.

Jesuo asertis, ke tiuj estas kondamnitaj.

Unuavide tia aserto ŝajnas ne akordi kun la grandanimeco de la Majstro.

Kondamnitaj de kiu kaj al kio?

La justeco de Dio estas kunigita kun la kompato, kaj la eterna infero estas nur dogma imagaĵo.

Tamen nepre necesas rekoni, ke kiuj ne kredas la grandecon de la propra destino, tiuj sin mem kondamnas en la plej malaltajn sferojn de la vivo. Pro la kutimo nur akcepti tion videblan, ili daŭre restos sur la polvo, memvole nekapablaj aliri pli altajn regionojn, dum la aliaj paŝas survoje al la certeco de la senmorta vivo.

La kredo estas amika lampo, kies flamon subtenas la eterna suno de l' fido kaj la blovoj de neado kaj dubo neniam estingas.

Sed la nekredo konas la vivon nur laŭ la ombroj ĵetataj de la propraj movoj, akceptante nenion ekster la nokto kaj la marĉo en kiujn ĝi sin mem kondamnis.

EMMANUEL

**(Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" — ĉapitro 163.)**

## La krono

"Kaj ili vestis lin per purpuro, kaj plektinte dornan kronon, surmetis ĝin al li." ( MARKO, 15 : 17. )

Preskaŭ nekredebla estas la nesingardeco de la plimulto de la nunaj disĉiploj de l' Evangelio, avidantaj la kronon de la mondaj triumfoj. Jam de longe la eklezioj de la falsita Kristanismo plezuras ĉe la grandiozaj spektakloj, imponantaj per grandegaj elmontroj de politika potenco. Kaj

necesas rekoni, ke multenombraj kristanspiritistaj societoj, ja ankoraŭ tiel novaj sur la mondo, delogiĝas al tiuj samaj inklinoj.

Individue la prozelitoj ambicias bonstaton, senobstaklan vojon, la honoran konsideradon de la mondo, ĉies respekton kaj fidelan rekonon de la noblaj principoj de ili konfesataj. Kiam tiaj facilaĵoj ne favoras ilin en la edifa servado, tiam ili sentas sin persekutataj, ĝenataj, malfeliĉaj.

Sed . . . kaj la Kristo? Ĉu ne sufiĉus la bildo de la dorna krono por moderigi ĉies maltrankvilecon?

Kompreneble la Majstro kunportis la Kronon de la Vivo ; sed li ne volis preterlasi la okazon instrui, ke por tiuj, dezirantaj supreniri sur la monton de la Dia Releviĝo, la krono de la Tero ankoraŭ estas el dornoj, suferado kaj senĉesa laboro. En la tempo, kiam la Sinjoro ekanoncis la Bonan Novaĵon, la Romanoj kronis sin per rozoj ; sed donante sian subliman lecionon, Jesuo volis komprenigi, ke liaj fidelaj disĉiploj devos atendi alispecajn insignojn.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 96.)**

## Larmoj

"Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos." -- *Jesuo.* ( MATEO, 11 : 28. )

Neniu, kiel la Kristo, dissemis tiom da ĝojo kaj fortanimeco sur la Tero. Tion rekonante, multaj disĉiploj amasigas argumentojn kontraŭ plorado kaj abomenas suferadon.

La Paradizo jam estus starigita sur la Tero, se oni ne havus motivojn de plorado. Pro tio Jesuo, kiu estis la Majstro de konfido kaj optimismo, vokadis al sia koro ĉiujn laciĝintajn kaj ŝarĝitajn sub la pezo de la surteraj elreviĝoj.

Li ne malbenis la malĝojajn : li ilin invitis al konsoliĝo.

Multaj rigardas larmojn kiel signon de spirita malforteco. Tamen Maria plorĝemis sur la Kalvario ; Petro plorbedaŭris post sia neado ; Paŭlo dronis en larmoj antaŭ la enirejo al Damasko ; la unuaj kristanoj ploradis en la cirkoj de martiriĝo . . . sed neniu verŝis malesperajn larmojn. Plorante, ili sekvis la vojon de la Sinjoro ; suferante, ili anoncis la Bonan Novaĵon pri la Elaĉeto ; martiriĝante, ili mortis fidelaj ĉe la superega konfido.

La laceco pro amo al la Kristo turniĝas en forton, la ĉenoj, portataj sub lia grandanima rigardo, aliiĝas en diajn ligilojn de savo.

La larmoj distingiĝas per specifaj devenoj. Se ili fontas el sincera, konstrua doloro, ili estas fluaĵo por elaĉeto kaj vivo ; sed se ili devenas de malespero, ili estas nenio alia ol mortiga veneno.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la madiumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 172.)**

## Juneco

"Sed forkuru de junulaj voluptoj, kaj sekvu justecon, fidon, amon, pacon, kune kun tiuj, kiuj vokas la Sinjoron el pura koro." -- *Paŭlo.* ( II TIMOTEO, 2 : 22. )

Tiuj, kiuj sin turnas al la junularo, preskaŭ ĉiam atribuas al ili tiel grandan povon, ke la junuloj fine dronas em plena senkonsileco, trompitaj kaj malatentaj. Oni atendas de ili la savon de ĉio.

Ni konsentas pri iliaj vastaj ebloj, sed ni ne povas forgesi, ke ĝuste tiu periodo de la surtera ekzistado prezentas la plej grandan nombron da bezonoj koncerne al orientado.

La junulo povos kaj ja faros multon, se tiuj, maljuniĝintaj en la spertado, ne forlasos lin en liaj laboroj. Nenion novan li starigos, se li ne profitos el la klopodoj de tiuj, kiuj pli frue laboris. En ĉio li dependos de siaj antaŭuloj.

La junecon oni povas kompari al esperplena forveturo de ŝipo por grava vojaĝo. La infaneco estis la preparo, la maljuneco estos la alveno. Ĉiuj etapoj postulas la instruojn de la spertaj maristoj, per kiuj oni lernas aranĝi kaj fini la vojaĝon kun la dezirinda sukceso.

Necesas konvene protekti la junulan intelekton kaj neniel proponi al la junuloj perspektivojn de iluzia superregado.

Ne ĉiam la junulaj deziroj estas signo de estonta sekureco.

La junularo povos fari multon, sed ili en ĉio sekvu "justecon, fidon, amon, pacon, kune kun tiuj, kiuj vokas la Sinjoron el pura koro".

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 151.)**

## Konvenciaj opinioj

"La homamaso respondis : Vi havas demonon ; kiu celas mortigi vin?" -- (JOHANO, 7 : 20. )

Ne tro alkroĉiĝu al la juĝoj de la homamaso. La konvenciamo kaj la kutimo havas potencan regadon super ĝi.

Se vi ame toleras la ofendojn, ĝi nomas vin malkuraĝulo.

Se vi pardonas kun grandanimeco, ĝi opinias vin stultulo.

Se vi pacience suferas, ĝi neas al vi ian valoron.

Se vi abnegacie dissemas la bonon, ĝi alnomas vin frenazulo.

Se vin karakteruzas la sankta, sublima amo, ĝi opinias vin malsanulo.

Se vi malŝatas la krudaĉajn ĝuojn, ĝi taksas vin anormala.

Se vi montriĝas piulo, ĝi asertas, ke vi frutempe laciĝis kaj maljuniĝis.

Se vi elektas simplecon, kiel vivregulon, ĝi kaŝe mokas vin.

Se vi respektas la ordon kaj la hierarkion, ĝi kvalifikas vin flategulo.

Se vi obeas la Leĝon, ĝi almontras vin kiel timulon.

Se vi estas prudenta kaj digna, ĝi nomas vin fanatikulo kaj mensmalfortulo.

Sed estas ĝuste tiu homamaso, kiu, per la voĉo de siaj estroj, predikas la amon al la similuloj, la kulton por la leĝeco kaj la adoradon al la devo, kvankam en ties rondo la troa vortmulteco ankoraŭ nun ne permesas la starigon de la interkompreniĝo.

Nepre necesas, ke ni toleru ĝian senprudentecon por la profita plenumado de niaj devoj antaŭ Dio.

Ne koleru nek senkuraĝiĝu.

Eĉ Jesuo, tute senprave, estis objekto de l' mokoj de la popolopinio.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 177.)**

## Gvidantoj de la mondo

"Jesuo respondis kaj diris al li : Vi estas la instruisto de Izrael, kaj ĉu vi ne scias tion?" -- (JOHANO, 3 : 10.)

En la religiaj rondoj, ĉefe en tiuj spiritistaj, estas ofta la apero de gvidantoj de la mondo, postulantaj pruvojn pri la ekzisto de la animo.

Venos tempo, kiam tiajn postulojn oni rigardos infanecaj, ĉar vere tiuj montoroj de la politiko, de la edukado kaj de la scienco esence demandas, ĉu ili ja ekzistas.

La respondo de Jesuo al Nikodemo, kvankam rilata al la problemo de la reenkarniĝo, prefekte koncernas la temon, ĉar la nuntempaj gvidantoj ĉiam ankoraŭ demandas pri la esencaj realaĵoj de la vivo.

Ni preĝu al Dio pri helpo al la homo, ke li ne plu provu trategmente eniri la domon de la progreso.

La senpripensa kuracisto, ĝis la konstatos la spiritan veraĵon, ĉiam renkontos dolorajn spertojn sur la kampo de siaj entreprenoj. La nur teoria instruisto estos multfoje ĵetita en disreviĝon. La nesperta administratoro daŭre sin elmetados al teruraj eraroj, ĝis li agos konforme al la lin koncernanta prirespondeco.

Tial la respondo de Jesuo perfekte aplikiĝas al la demandoj de la nuntempaj instruistoj. Transformiĝintaj en esploristojn, ili plejofte kun ironio sin turnas al ni, postulante la certecon pri la ekzisto de la spirito, kvankam ili gvidas la homojn kaj sin trudas en la vivon de niaj homaj fratoj. Konsidere al tiuj cirkonstancoj kaj al tio, ke temas pri problemo al ili tiel grava, decas, ke ili ne demandu, ĉar ili ja devas scii.

EMMANUEL

**(Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 111.)**

## Kio estas inter ni kaj la Kristo?

"Kio estas inter ni kaj vi, Jesuo Nazaretano? Ĉu vi venis, por pereigi nin? mi scias, kiu vi estas : la Sanktulo de Dio." -- ( MARKO, 1: 24.)

Grava eraro estas supozi, ke la Dia Majstro metis finon al sia agado sur la Kalvario.

Jesuo daŭre vojiras ĉien tra la mondo ; lia elaĉeta Evangelio iom post iom konkeras la terenon de la homaj koroj.

Tiu fakto devas esti memorigata, ĉar ankaŭ la malicaj spiritoj ĉiutage klopodas por forpuŝi la Sinjoron.

La evangeliisto raportas pri pervesaj estaĵoj, kiuj posedis la korpon de la personoj. Sed tiuj inferaj intelektoj ĉiam ankoraŭ superregas vastajn organizojn en la mondo.

Ĉe la agado politika, starigita por subteni la principojn de la dia ordo, ili montriĝas sub la nomoj malkonkordo kaj tiraneco ; ĉe la komenco, kreita por estigi fratecon, ili aperas kun la nomoj ambicio kaj egoismo ; ĉe la religioj kaj la sciencoj, sanktaj organizoj por la universala progreso, ili prezentiĝas, portante la nomojn orgojlo, vanteco, dogmemo kaj sekta netoleremo.

Ne nur la homa korpo suferas la obsedon de malicaj spirirtoj. Ĝin multe pli suferas la kolektivoj kaj la institucioj.

Kaj kiam Jesuo alproksimiĝas per la Evangelio, personoj kaj organizaĵoj haste demandas : "kio estas inter ni kaj la Kristo? kiel nin koncernas la spirita vivo?"

Necesas daŭre vigli antaŭ tiaj subtilaĵoj, ĉar la malamiko ankaŭ penetradas la rondojn de la evangelia Spiritismo, portante la brilajn tunikojn de la falsa scienco.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 144.)**

## Spirita Memregado

"Kaj tamen mi ne estas sola, ĉar la Patro estas kun mi." -- *Jesuo* -- ( JOHANO, 16 : 32.)

Dum la momentoj de aflikto, la homo vidigas kie troviĝas la eksteraj fortoj, regantaj lian animon.

Dum la gravaj horoj de elprovado, ĉe la suferado aŭ la morto, la avaruloj kriegas pro siaj pasemaj havaĵoj, la arbitruloj postulas la obeadon, pri kiu ili sin opinias ŝuldataj, la trosentimentalaj plendsopiras la objekton de sia amo.

Sed Jesuo sur la superega kampo de la ekstremaj surteraj momentoj, sin montras kiel reganto de si mem, al ni instruante, ke la sublima konformiĝo al la decidoj de la Patro estas la plej efika rimedo por memregado.

Nature alligita al plej diversaj fortoj, li tamen en la Kalvaria Tago lasis sin regi de neniu el ili.

Li lojale obeadis la homan registaron, sed Pilato ne timigas lin.

Li respektis la leĝon de Moseo, sed Kajafas ne imponas lin.

Li plej karese amis la disĉiplojn, sed la korinklinaj motivoj ne cedigas al li la koron.

Li flegadis kun admirinda sindono sian laboron instruan kaj helpan, resanigan kaj konsolan, sed lia animo ne logiĝas de la ebleco resti surtere.

La ago de Judaso ne elvokas malbenon ĉe li.

La maldankemo de la bonfaritoj ne malesperigas lin.

La plorado de la virinoj en Jerusalemo ne malfortigas lian firman kuraĝon.

La sarkasmo de la homamaso ne sukcesas rompi lian silenton.

La kruco ne konfuzas lian serenecon.

Pendumite sur la trabo, li petas pri senkulpigo de la popola nescio.

Profunda kaj senmorta estas lia leciono de spirita memregado. Ĝi montras al ni la neceson, ke ni estu "ni mem" dum la plej malfacilaj bataloj de la vivo, kun trankvila konscienco altigita al la Dia Justeco kaj fidela koro gvidata de la Dia Volo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 170.)**

## Kio estas la karno?

"Se ni vivas per la Spirito, en la Spirito ni ankaŭ iradu." -- *Paŭlo.* ( GALATOJ, 5 : 25.)

Preskaŭ ĉiam, kiam oni parolas pri spiriteco, multaj personoj sin prezentas kun plendoj kontraŭ la postuloj de la karno.

Estas vero, ke la apostoloj multfoje parolis pri la voluptoj de la karno, pri ĝiaj krimaj impulsoj kaj malutilaj deziroj. Eĉ ni ofte sentas la bezonon profiti tiun simbolon por igi pli kompreneblaj la instruojn de la Evangelio. La Majstro mem figure instruis, ke la spirito, kiel dia elemento, estas forta, sed la karno, kiel homa esprimo, estas malforta.

Sed kio estas tamen la karno?

Ĉiu spirita individuo havas sian fluidecan korpon, kaj ĉu vi ankoraŭ ne komprenis, ke la karno estas nenio alia ol kunmetaĵo el densiĝintaj fluidaĵoj? Kompreneble tiuj fluidaĵoj, post kombiniĝo,

submetiĝas al la postuloj de la surtera ekzistado laŭ tio, kion vi nomas leĝo de heredeco ; sed tiu kunmetaĵo estas pasiva kaj per si mem ne decidas. Ni povas rigardi ĝin, kiel surteran loĝejon direktatan de la spirito kaj alprenantan la bonajn aŭ malbonajn karakterizaĵojn de sia posedanto.

Parolante pri pekoj de la karno, ni do komprenu tiun esprimon, kiel erarojn naskitajn de la morale malsupera stato de la surtera spirita homo.

La malnoblaj deziroj, la brutaj impulsoj, la maldankemo, la trompemo, la perfidemo neniam apartenis al la karno.

Necesas, ke la homo ekkomprenu sian bezonon de memregado, kiu vekus lian kapablon sin mem disciplini kaj renovigi en Jesuo-Kristo.

Unu el la plej grandaj absurdoj de kelkaj disĉiploj estas atribui al tiu kunmetaĵo el pasivaj ĉeloj, servantaj al la homo, la aŭtorecon de la krimoj kaj eraroj farataj sur la Tero, ĉar ni ja scias, ke ĉio fontas el la spirito.

EMMANUEL

**( Mesaĝo psikografie ricevita per la mediumo F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 13.)**

## Origino de la tentoj

"Sed ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia dezirado, kaj delogata." -- ( JAKOBO, 1 : 14.)

Ĝenerale, kiam ekestas la grandaj malbonoj, la falintoj imputas al Dio la kaŭzon de sia falo. Malfrue memorante, ke la Patro estas Ĉiopova, ili argumentas, ke la tento povis veni nur el Dia Decido.

Jes, Dio estas la Absoluta Amo, kaj tiel vera tio estas, ke la defalintoj restas starantaj, disponante la eternajn valorojn de l' tempo, subtenataj de liaj kompatemaj manoj. Sed la tentoj ne fontas el la Ĉiela Patro.

Ĉu respondecus ŝtatisto pri la malrespektaj agoj de tiuj, kiuj atencas la de li starigitan leĝon?

La instruo de la Apostolo estas profunde tuŝita de ĉiela lumo.

*“Ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia volupto.”*

Ni aparte ekzamenu ambaŭ substantivojn “tento” kaj “volupto”. La unua estas eksterigo de la dua, kiu já konsistigas la malvirtan kaj malican bazon de la primitiveca homa naturo. Esti tentata signifas aŭskulti propran malicemon, flegi proprajn malnoblajn dezirojn, ĉar eĉ se la malbono venas de ekstere, ĝi konkretiĝas kaj persitas nur tiam, se al ĝi ni nin tiras per la koro.

Fine, ni elstarigu la verbon “altiri”. Ni taksos la mezuron de nia malsupereco laŭ la naturo de la aferoj kaj situacioj, kiuj nin altiras.

La averto de Jakobo estas ĝusta gvidilo, por ke ni analizu la originon de la tentoj.

Memoru, ke ĉiu tago havas apartajn magnetajn situaciojn. Konsideru la esencon de ĉio, kio vin altiris dum paso de la horoj, kaj vi forigos proprajn malbonojn, farante bonon laŭ la deziro de Jesuo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro “Vojo, Vero kaj Vivo” - ĉapitro 129.)**

## Ĉe la propagando

“Kaj ili diros al vi : Jen tie! Jen ĉi tie! Ne foriru, nek sekvu.” -- *Jesuo.* ( SANKTA LUKO, 17: 23.)

La admonoj de la Majstro al la disĉiploj estas tre precizaj, ke ili veku necertecon aŭ nedecidemon.

Kiam tiom multe da sektoj alvokas la Kriston por siaj intelektaj devojiĝoj, estas konvene, ke la novaj adeptoj, ĉe la lumo de la Konsolanto, primeditu la altan signifon de tiu ĉi paragrafo de Luko.

Ĉe la pure kristana propagando, ne sufiĉas diri, kie estas la Sinjoro. Nepre necesas lin montri per la propra konduto.

Multaj pilgrimas tempojn kaj altarojn, serĉante Jesuon.

Ŝanĝi la religian kredon povas signifi ekiron sur novan vojon, sed ĝi ankaŭ povas esti daŭrado de konfuziteco.

Necesas trovi la Kriston en la interna sanktejo.

Kristanigi la vivon ne estas doni al ĝi novan eksteraĵon, sed ja ĝin interne rebonigi.

Kiuj nur parole asertas, ke la Majstro troviĝas tie aŭ ĉi tie, tiuj prenas sur sin gravegan respondecon. La prozelitisma zorgo estas danĝera por tiuj, kiuj logiĝas de la belsoneco de l' ekzemplomanka parolo.

La sincera disĉiplo scias, ke, se facile estas paroli, tamen malfacile estas evidentigi la celojn de la Sinjoro en sia propra ekzistado. Nepre necesas fari la bonon, antaŭ ol ĝin instrui al alia, ĉar Jesuo rekomendis neniel sekvi tiujn predikistojn, kiuj nur dirus, kie oni trovu la Filon de Dio.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 19.)**

## Kion vi serĉas?

"Kaj Jesuo sin turnis, kaj vidis ilin sekvantajn, kaj diris al ili : Kion vi serĉas?" -- ( SANKTA JOHANO, 1: 38.)

La vivo en si estas dia kolekto da spertoj.

Ĉiu nova ekzistado proponas novajn sciojn al la homo. Sed plej gravas la akirado de la religiaj valoroj, kiu ja prezentas la movon de la animo por ties definitiva lumiĝo al Dio.

La homoj tamen etendas al tiu dia sektoro siajn malvirtajn sentojn, en la malsupera ludo de la egoismaj interesoj.

La ŝtonaj temploj restas plenaj de nepravigeblaj promesoj kaj absurdaj votoj.

Multaj piuloj rigardas la Dian Providencon kiel subaĉeteblan forton, eman al privilegioj kaj preferoj. Aliaj serĉas la helpon de la spirita mondo por la solvo de malnoblaj problemoj.

Ĉiuj forgesas, ke la Kristo instruis kaj ekzemplis.

La Kalvaria Kruco estas vivanta simbolo.

Kiu deziras liberecon, tiu bezonas obei la superegajn decidojn. Sen la kompreno pri Jesuo, en la intima kampo, aligita al la ĉiutaga agado, la animo restos ĉiam sklavigita de malsuperaj zorgoj.

Neniu forgesu tiu veraĵon, ke la Kristo troviĝas ĉe la sojlo de ĉiaj temploj en la mondo, demandante, kun intereso, la enirantojn : *"Kion vi serĉas?"*

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 22.)**

## Tempo de Fido

"Kaj li diris al ili : Kie estas via vido?" -- (SANKTA LUKO, 8 : 25.)

La ŝtormo ŝancelis la kuraĝon de la plej fortaj disĉiploj. Konsternitaj pro la furiozo de la elementoj, ili petas helpon de Jesuo per laŭtaj krioj.

La Majstro helpas ilin sed poste demandas

-- *Kie estas via fido?*

La bildo proponas larĝampleksajn konsiderojn. La demando de Jesuo klare montras la bezonon teni la fidon, kiam ĉio ŝajnas obskura kaj perdita. Ĉe tiaj cirkonstancoj montriĝas la oportuno de l' fido en ties ĝusta tempo.

Se estas tempo por laboro kaj ripozo, semado kaj rikolto, same montriĝos la fido en la oportuna horo.

Neniu ekzercos sin al optimismo, kiam la cirkonstancoj kune favoras la bonstaton. Estas malfacile montri amikecon en la feliĉaj horoj.

La disĉiploj kompreneble atendu okazojn de pli granda lukto, kiam ili bezonos pli vaste kaj intense praktiki la instruadon de la Sinjoro. Estus neeble, sen tio, taksi la valorojn.

En nia dolorplena nuneco, sennombraj kunfratoj alvokas la senperan helpon de la Kristo. Kaj lia helpo ĉiam nepre venas, ĉar senlima estas la ĉiela korfavoro, sed post venko de la malfacilaĵoj ili atendu la demandon :

-- *Kie estas via fido?*

Kaj novaj obstakloj leviĝos, ĝis la disĉiplo kapablos sin regi, edukiĝi kaj serene venki per la ricevitaj instruoj.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo -- ĉapitro 40.)**

## Puraj Manoj

"Kaj Dio faris per la manoj de Paŭlo eksterordinarajn miraklojn." -- ( LA AGOJ DE LA APOSTOLOJ, 19 : 11.)

La Evangelio ne sciigas al ni, ke Paŭlo el Tarso faris mirindaĵojn, sed ja ke Dio faris eksterordinarajn mirindaĵojn pere de liaj manoj.

La Patro ĉiam same agos, utiligante ĉiujn filojn, kiuj sin prezentos al Li kun puraj manoj.

Multaj spiritoj, pli konvenciamaj ol propre religiaj, rigardis tiun sciigon de La Agoj kiel informon pri certaj privilegioj donitaj al la Apostolo.

Sed necesas scii, antaŭ ĉio, ke tia dono ne estas ekskluziva. La plimulto el la kredantoj preferas fiksi la bildon de la sanktigita Paŭlo sen konsideri la aktivan laboriston.

Kiom kostis al la Apostolo la pureco de liaj manoj?

Tre malmultaj demandas pri tio.

Ni rememoru, ke la amiko al la nacianoj estis fama rabeno en Jerusalemo, okupis altrangajn publikajn postenojn, akiris situaciojn de superregado ; sed por ke Dio utiligu liajn manojn, li suferis ĉiajn humiligojn kaj pretis al ĉiuj sinoferoj por la bono de la proksimulo. Li instruis pri la Evangelio sub mokoj kaj skurĝado, afliktoj kaj ŝtonfrapoj. Kvankam li skribis lumajn epistolojn, li tamen neniam forlasis sian modestan teksilon ĝis la korpa kadukiĝo.

Konsideru do la apartaĵojn de la afero kaj atentu pri tio, ke Dio ĉiam restas la sama Patro, ke la dia korfavoro ne ŝanĝiĝis sed ja postulas purajn manojn por la edifa servado al la homaro. Tia postulo estas logika kaj necesa, ĉar la verko de la Plejalta devas brilegi sur la homaj vojoj.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 74.)**

## Ni ĉiam trovos

"Ĉar ĉiu petanto ricevas ; kaj la serĉanto trovas." -- *Jesuo.*
( SANKTA LUKO, 11: 10.)

Sentante ian bezonon, la kredanto maŝine rememoras la promeson de la Majstro, kiu certigis konforman respondon al ĉiu petanto.

Gravas tamen pripensi, kion oni serĉas. Kompreneble oni ĉiam ricevos, sed necesas konscii la objekton de sia peto.

Jesuo asertis : "Ĉiu serĉanto trovas."

Kiu celas malbonon, certe renkontos malbonon.

Estas perfekta respondeco inter nia animo kaj la animo de la aferoj.

Kiuj serĉas rabistojn, aŭskultante la trompajn sugestojn de sia interna mondo, tiuj rigardas ĉiujn homojn malhonestaj. Tiel same okazas al tiuj, kiuj, nutrante aspiron al kredo, alproksimiĝas kun suspektemo al la religiaj rondoj. Ili neniam trovas la fidon, ĉar ĉion ili ekzamenas per la ilin reganta malkonfido. Ili tiom eksperimentas kaj insistas, manovrante siajn

malsuperajn celojn, ke ili efektive trovas nenion alian krom la atendataj elreviĝoj.

Por trovi la bonon, necesas serĉadi ĝin ĉiutage.

Sendube, sur tia kampo de ŝokaj bataloj kiel la Tero, sukceso tuj kronas la serĉadon de malbono pro ties regado super la homoj, sed la ĉerpado de bono ne estas tiel facila. La bonon tamen oni atingos kiel dian, eternan valoron.

Necesas do forte vigli super la decido ion serĉadi, ĉar la Majstro ja asertis : "ĉiu serĉanto trovas" ; kaj kion ni serĉas, tion ni certe trovos.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 109.)**

## Spiritaj donacoj

"Kaj dum ili malsupreniris de la monto, Jesuo ordonis al ili dirante: Rakontu al neniu la vizion, ĝis la Filo de homo releviĝos el la mortintoj." -- ( SANKTA MATEO, 17: 9.)

Se la homo bezonas grandan prudenton ĉe la agoj de la ordinara vivo, pli zorga li nepre devas esti en la rilatoj kun la spirita sfero.

Kaj pri tio la Majstro mem donas al ni ekzemplon.

Kondukinte Jakobon, Petron kaj Johanon al la mirindaj revelacioj sur la monto Tabor, kie li transfiguriĝis antaŭ la okuloj de siaj kunuloj apud gloraj senditoj de la altaj spiritaj regionoj, Jesuo plenzorge rekomendas : "*rakontu al neniu la vizion, ĝis la Filo de homo releviĝos el la mortintoj."*

La Majstro ne preskribis la mensogon, sed ja konsilis retenadi la veron ĝis oportuna okazo.

Ĉiu situacio postulas certan kvanton da sciado.

Jesuo sciis, ke la antaŭtempa rakonto de la sublima vizio povus veki miskonprenon kaj serkasmon ĉe la trivialaj kaj senutilaj interparoladoj.

Ni ne forgesu, ke, kvankam ĉiuj ja marŝas al Dio, tamen ne samaj estas la vojoj.

Se vi konservas altvaloran spiritan sperton, vi sendube povos utiligi ĝin ĉiutage, per konvenaj dozoj, por helpo al viaj rondanoj en ties apartaj situacioj ; sed ne malŝatu, kion al vi donacis la plej alta spirita sfero, ĝin elmetante al krimaj miskomprenoj, ĉar ĉio akirita el la Ĉielo estas netranscedebla realigo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 128.)**

## Vi sekvu min

"Jesuo diris al li : Se mi volas, ke li restu, gix mi venos, kio estas al vi? Vi sekvu min." -- ( SANKTA JOHANO, 21 : 22.)

En la kristanaj komunumoj ni ofte vidas kamaradojn forte zorgantajn pri la taskoj difinitaj al aliaj fratoj.

Indas tamen konsideri, kiom multe progresus la mondo, se ĉiu homo zorgus sian parton en la komunaj devoj kompetente kaj sincere.

Ĉu iu el niaj amikoj estis vokita al aliaj devoj?

Ni lin kuraĝigu per nia sincera komprenemo.

Kelkfoje unu el ili montriĝas al ni aliiĝinta, kunuloj lin akuzas kaj multaj lin rigardas portanto de danĝeraj tentoj. Moviĝas haste faritaj kritikoj kaj juĝoj. Kiu tamen povos penetri la kampon de la kaŭzoj? Ĉu ni okupas la altan pozicion de tiu, kiu kapablas ekzameni la okazaĵojn el ĉiuj vidpunktoj? Tio, kio ŝajnas falo aŭ apostatiĝo, eble prezentas novajn

decidojn de Jesuo rilate al la elaĉeto de tiu amiko, kiu nun ŝajne staras malproksime.

La Bona Paŝtisto daŭre viglas. Li pormesis, ke el la ŝafoj, kiujn al li konfidis la Patro, neniu pereos.

Tial estas grave, ke ni perfekte plenumu la taskojn al ni komisiitajn. Ĉiu bezonas koni siajn proprajn devojn.

Ĉe tia nivelo de scio kaj sinteno, ĉiam sin proponas multe da nobla plenumenda laboro.

Se al viaj mortemaj okuloj iu frato ŝajnas devojiĝinta penu kiel eble aŭskulti la admonon de Jesuo al la fiŝisto el Kapernaum : "*Kio estas al vi? Vi sekvu min.*"

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vojo, Vero kaj Vivo" -- ĉapitro 2.)**

## Libera Eklezio

"Sed la supera Jerusalem estas libera, kiu estas patrino nia." -- *Paŭlo.* ( GALATOJ, 4 : 26.)

La aparta ekzameno de tiu paragrafo inspiras temon de senfina grandeco al la rondoj de la kristanaro.

La parolo de la apostolo al la nacianoj rememorigas nin pri la libera eklezio de la Kristo, ne en la mallarĝa homa sfero, sed en la senfino de la dia penso.

La spirito de orgojlo kaj sektismo, de longe reganta la laborojn de la fido, renkontas en la aserto de Paŭlo el Tarso la antidoton al siaj venenaj zorgoj.

En ĉiuj tempoj vivis sur la Tero la noblaj ekskomunikitoj, la bravaj miskomprenitoj kaj la sublimaj kalumniitoj.

Ili pasis inter la homoj, kiel ankoraŭ hodiaŭ, persekutataj kaj malŝatataj, meze en sarkasmo kaj indiferenteco.

Kelkfoje, pro malcedo al la krimaj ekspluatoj de fanatikeco, ili spertas la socian ekzilon ; en aliaj okazoj ili estas rigardataj kiel ateistoj pro siaj miskomprenataj ideoj.

Tiel okazas, ĉar, iam kaj iam, ventegoj de malamoj kaj duboj blovas en la senzorgajn ekleziojn de la Tero, kaj la kredantaro, forgesinte la "ne juĝu", sin ĵetas en turmentajn bataladojn.

Sed tiaj malpacoj ne konfuzas la trankvilan konsciencon de tiuj anatemitoj, kiuj sentas sin sub la protekto de la Dia Povo. Ili instinkte konscias, ke trans la obskura sfero de la fizika mondo brilegas la nevidebla, suverena templo, kie Jesuo akceptas siajn fidelajn servantojn, ilin ne distingante laŭ la koloro nek la formo de iliaj vestoj.

Bonfarantoj kaj servantoj, ekskomunikitaj el la homaj vojoj! Se vi havas senmakulan konsciencon, ne ĉagrenu vin la ŝtonĵetado de l' homoj, kiuj disiĝas pro sia bedaŭrinda malkonsentemo!

En la spirita vivo estas Eklezio respekteginda kaj libera, kiu estas protektema patrino de ni ĉiuj! . . .

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro Vinberejo el Lumo, ĉapitro 55.)**

## Sublima rekomendo

"Kaj li ne permesis al li, sed diris al li : Iru al via domo, al la viaj, kaj rakontu al ili ĉion, kion faris la Eternulo por vi, kaj kiel Li kompatis vin." -- ( SANKTA MARKO, 5 : 19.)

Eminente signifoplena tiu parolo de Jesuo al la demonhavinto, kiu reakiris sian ekvilibron tuŝite de lia dia amo.

Tiu malsanulo, kiu post la resaniĝo sentis sin turmentata de l' nekomprenemo de la aliaj, petegis de la Sinjoro permesi lin resti kun li por ĝui lian subliman kompanion. Sed Jesuo ne permesas kaj rekomendas al li iri al la siaj por rakonti al ili pri la ricevitaj bonfaroj.

Kiom da disĉiploj imitas la konduton de tiu malsanulo, kiu estis akompanata de legio da perversaj demonoj!

Kun la okuloj malfermitaj por la vero kaj la koroj tuŝitaj de nova lumo, ĉe la unua malfacilaĵo de la vojo ili emas forkuri de la mondo, malsategas ripozon apud la Nazaretano, forgesante, ka la Majstro senĉese laboras.

La zorgo de la lernanto de Kristo ne estu havigi al si ĉielajn feriojn, sed ja plenumi la aktivan servadon, al kiu li estas vokita en ĉiu loko, situacio, aĝo kaj tempo.

Se vi ricevis, amiko mia, la lumon de la Sinjoro, iru servi al la Majstro ĉe la viaj, ĉe tiuj, kiuj marŝas kun vi. Se vi ne havas la rektlinian familion, vi tamen ja posedas tiun nerektan. Se vi ne havas parencojn, vi tamen ja havas najbarojn kaj kunulojn. Rakontu la bonfarojn de la Savinto, montrante vian propran resaniĝon. Kiu elmontras sian renoviĝon en Kristo, tiu kapabliĝas kunlabori por la spirita renoviĝo de aliaj. Koncerne vian propran bonstaton, al ĝi vi estos kondukita en la oportuna momento.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 111.)**

## La parolo estas kreiva

"Sed tio, kio eliras el la buŝo, elvenas el la koro, kaj profanas la homon." -- *Jesuo.* ( SANKTA MATEO, 15 : 18.)

Tiu instruo de la Majstro, sub la vualo de l' litero, enhavas profundan averton.

Estas necese prizorgi la koron, kiel elsendilon de la parolo, por ke oni ne perdu la harmonion bezonan al sia propra feliĉo.

Kio elvenas el la koro kaj el la menso tra la buŝo, tio estas viva pulsanta forto, kiu tiras la homon al la bono aŭ al la malbono laŭ la naturo de la elsendo.

El la interno de l' tiranoj, per tiu proceso, devenas la komenca movo de la militoj, detrua movo, kiu revenas al sia fonto, semante ruinon kaj ekstermadon.

El la animo de l' kalumniantoj elfluas la venenoj, kiuj turmentas la noblakorajn spiritojn, sed kiuj al ili refluas por nigrigi la horizontojn de iliaj mensoj.

El la koro de l' maliculoj, perversuloj kaj malhumanuloj naskiĝas, per la potenco de la parolo, la faloj, la krimoj kaj la maljustaĵoj ; sed ne senpune ili agigos tiajn perturbajn elemntojn, ĉar tago venos, kiam ili rikoltos la amarajn fruktojn de la malfeliĉa movado, kiun ili impulsis.

Sammaniere la ĝojo semita per edifa, bonefika parolo, kreskas kaj donas siajn fruktojn.

La frata helpo disĵetas senlimajn bonfarojn, kaj la parfumo de l' bono, eĉ se verŝita sur la sendankajn, revenas per nevideblaj ondoj por refreŝigi la ĝin elsendantan frunton.

La bona ago estas bonefika forto en konstanta aktiveco ĉirkaŭ ties plenumanto.

Estas nemezureblaj, edifaj energioj ĉirkaŭ tiuj, kiuj tenas vigla la flamon de la bonaj pensoj por lumigi la aliulajn vojojn per stimule nobla konversacio.

La psikaj elementoj, kiujn ni eksterigas tra la buŝo, estas potencoj agantaj en nia nomo, aktivaj faktoroj influantaj, sub nia respondeco, proksime aŭ diste, konforme al niaj plej sekretaj intencoj.

Estas nepre necese vigli super la buŝo, ĉar la parolo kreas, sugestas, inklinigas, ŝanĝas, renovigas aŭ detruas, kiel vivanta disradiado de nia personeco.

Ĉiutage, en ĉiuj okazaĵoj de la vivo, ni rememoru kun la Dia Majstro, ke la parolo elvenas el la koro kaj ja tial profanas la homon.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 97.)**

## Zorgu, kiel vi vivas

"Kaj vokinte al si dek siajn servistojn, li donis al ili dek min' ojn, kaj diris al ili : Negocadu ĝis mi revenos." -- *Jesuo*. ( Sankta luko, 19 "13.)

Kun la bezona pensmatureco, la homo ekkomprenos, ke lia tuta ekzistado prezentas vastan reton da spiritaj negocoj, kaj ke la vivo en si estas nenio alia ol konstanta religia ago koncernanta la diajn devojn, kiuj nin ligas al Dio.

Ĝis nun la mondo postulas fidateston nur de tiuj personoj, al kiuj estas difinita esence religia mandato.

La romkatolikoj, ŝarĝante per postuloj siajn pastrojn, ilin deklinas de ilia apostola laboro. La plimulto de la protestantoj komisias al la pastoroj la pli kompletajn devojn de la kulto. La spiritistoj postulas de doktrininstruantoj kaj mediumoj la superegajn elmontrojn de karito kaj pureco, kvazaŭ la lumo kaj la vero de la Nova Revelacio estus ekskluziva propraĵo de iuj eraremaj kapoj.

Nepre necesas tamen konsideri, ke la kristana atesto, sur la kampo de la pasema surtera batalado, estas devo de ĉiuj homoj, sen ia escepto.

Ĉiu kreito estas vokita de la Providenco al difinita fako de la spiritaj laboroj sur la Tero.

La komercisto plenumas negocojn pri provizado kaj frateco.

La administratoro negocas pri orientado, distribuo kaj respondeco.

La servisto estas kondukita al negocoj pri obeo kaj edifo.

La patroj kaj patrinoj surteraj estas vokitaj al negocoj pri abnegacio, ekzemplado kaj sindono.

La ĉarpentisto ĉarpentas kolonojn por tiu viva templo, la hejmo.

La sciencisto proponadas ekvaciojn de progreso por plibonigi la bonstaton de la mondo.

La kuiristo laboras por nutri la laboriston kaj la scienculon.

Ĉiuj homoj vivas en la Verko de Dio kaj ĝin utiligas por iam atingi la dian grandecon. Kiel fruktuzantoj de la havaĵoj apartenantaj al la Patro, ili troviĝas sur la kampo de la nuntempaj oportunoj, negocante la valoraĵojn de la Sinjoro.

Pro tiu veraĵo, amiko, vidu, kion vi faras, kaj ne forgesu subordigi viajn dezirojn al Dio en la negocoj, kiuj dum kelka tempo estas al vi konfiditaj en la mondo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 2.)**

## Ili ne komprenas

> "Dezirante esti instruistoj de la leĝo, kvankam ili ne komprenas tion, kion ili diras, nek tion, pri kio ili faras aserton." -- *Paŭlo.* ( I TIMOTEO, 1 : 7.)

Ĉie troviĝas la amasoj, kiuj misuzas la parolon.

Vigliĝas detruaj disputoj en la sferoj de la scienco, politiko, filozofio kaj religio, sed ne nur en tiuj kampoj de la intelektaj laboroj manifestiĝas tielaj senprudentaĵoj.

Ĉi-rilate, preskaŭ ĉie en la mondo la socio montriĝas kiel batalkampo, pro la kondamninda influo de tiuj, kiuj per malĝustaj informoj poze sin trudas kiel doktoroj. Kun pretendema aŭtoritateco en siaj senbazaj opinioj, ili estigas ĝeneralan agitadon, malfruigas noblaj farojn, grandparte detruas la ĝermojn de l' bono, venenas fontojn de grandanimeco kaj fido, kaj, precipe, deturnante la fluojn de la progreso, ili transformas la hejmajn sanktejojn en tranĉeojn de la *ĝentila* malamikeco.

Tio estas nekonsciaj venenistoj, kiuj dissemas malharmonion, ne komprenante tion, pri kio ili asertas.

Sed kiu ion diras, tiu ion semas en la vivogrundo, kaj kiu decidas tion aŭ tion alian, tiu firmigas la semadon.

Multaj noblaj Spiritoj kultivas la arbojn de la vero, de la bono kaj de la lumo ; sed ĉie ankaŭ agadas tiuj, kiuj semas la trudherbojn de la nesciado, la kardojn de la kalumnio, la dornojn de la klaĉado. Per ĉi tiuj estiĝas la konfuzo kaj la stagno. Ili misuzas la parolon sed duoble pagas por sia senprudenteco, ĉar, kvankam ili ambicias fariĝi doktoroj de la leĝo kaj pleje klopodas por konfuzi ties paragrafojn, ili, eĉ longe restante ĉe sia malsaĝa sintenado, ĉiam pli proksimiĝas al la sekvoj de siaj agoj, en kies rondo tiu sama leĝo trudas al ili la realaĵojn de la eterna vivo per seniluziiĝo, sufero kaj morto.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 15.)**

## Sur la kampo

"La kampo estas la mondo." -- *Jesuo*. (SANKTA MATEO, 13 : 38.)

Jesuo havas la tutan mondon kiel sian kampon de servado.

Tie, kompreneble, kiel sur ĉiu kampo de terkulturado, estas senfina latento el realigoj, kun bonegaj grundoj kaj regionoj bezonantaj helpon, korektadon kaj protekton.

Iafoje, post fekundaj arbaroj elstariĝas senmezuraj marĉejoj postulantaj drenadon kaj senprokrastan helpon.

Apud lumaŭreolitaj montoj kuŝas valoj envolvitaj en nedifinebla ombro.

Rektaj trunkoj leviĝas apud torditaj arboj ; mortintaj branĉoj kontrastas kun verdaj, nestoplena frondaroj.

La grandega terposedaĵo de la Kristo bezonas sinoferemajn laboristojn, kiuj ne havu personajn preferojn koncerne lokojn de servado aŭ specojn de tasko.

Multaj laboristoj ĉiutage prezentiĝas antaŭ la Labordonanta Mastro, sed tre malmultaj estas veraj servantoj.

La plimulto el la taskoprenantoj, kiuj kandidatas por laborado kun la Majstro, ne traspasas la kapablon kultivi certajn florojn, retropaŝas ĉe la malŝatataj marĉoj, timas la dezertajn regionojn, aŭ konsterniĝas antaŭ la amplekso de la laboro, retiriĝante en longajn kaj ruinigajn ŝanceliĝojn aŭ fuĝante de la malsanigaj lokoj.

Kelkfoje troviĝas lertaj hortikulturistoj aŭ ĝardenistoj, kiuj tamen preskaŭ ĉiam ripozas sur siaj titoloj kaj ektimas antaŭ la sovaĝaj kaj multformaj terenoj.

Jesuo tamen ne ripozas, plu atendante kunlaborantojn en la eternaj realigoj por starigo de la Ĉiela Regno sur la Tero.

Vi pripensu tiun veraĵon kaj riĉigu viajn kvalifikojn por kunlaborado, ilin perfektigante, ilin intense utiligante en la verkoj de l' senĉese kaj sendistinge praktikata bono . . .

Certe oni ne improvizas kunlaboranton por Jesuo, sed ne forgesu prepariĝadi, tagon post tago, al tiu glora celo . . .

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 68.)**

## Al la disĉiploj

"Sed ni predikas Kriston krucumitan, por Judoj falilon, kaj por Grekoj malsaĝon.' -- *Paŭlo.* ( I KORINTANOJ, 1 : 23.)

La moderna vivo, kun siaj brilaj realaĵoj, daŭre instruas al la religiaj komunumoj de Kristanismo, ke prediki estas elmontri la grandecon de la principoj de Jesuo en la propra ĉiutaga konduto.

La homo enirinta la fremdan teritorion de paroladoj, sen agoj konformaj al la nobleco de sia parolo, ĉiam pli kaj pli elmetadas sin al ridindo kaj neado.

Jam de multaj jarcentoj superegas la movadon de la utilismaj filozofioj. Kaj ankoraŭ hodiaŭ ne malmultaj estas la gvidantoj, kiuj pripensas la starigon de egoismaj konstruaĵoj surbaze de persona magneteco, kaj la psikologoj, kiuj malkaŝe instruas la subtilan ekspluatadon de la homamasoj.

Ĝuste en tiu obskura kampo de la surtera intelekta disvolviĝo la lernantoj de la Kristo elstaras kiel pintuloj de ties edifanta filozofio de boneco kaj rezignacio, montrante per siaj individuaj agoj la dian verkon de Tiu, kiu preferis krucumon al ĉia pakto kun malbono.

Pro tio novaj disĉiploj estiĝas ekster la organizita pastraro. Kiel fratoj de suferantoj, de simplanimuloj, de mizeruloj, la kristanaj spiritistoj renkontas terurajn obstaklojn en la toksita kulturo de la nuna jarcento kaj en la utilisma spirito de la egoismaj ideoj.

Antaŭ preskaŭ du mil jaroj, Paŭlo el Tarso aludis la skandaliĝon, kiun la konduto de la adeptoj vekadis ĉe la judoj, kaj la falsan impreson de frenezo, kiun ĝi faris al la animoj de l' grekoj.

La nunaj tempoj estas ĝuste tiuj samaj, kiujn Jesuo proklamis tiam alvenintaj al la Planedo ; kaj judoj kaj grekoj, en la aktuala formo de malhonestaj negocistoj kaj vantaj intelektuloj, daŭre restas en sia origina pozicio. Ĉe ili aperas la sekvanto de la Majstro, transdonante Lian instruadon per parolo sanktigita de atestantaj faroj.

Leviĝas malfacilaĵoj, sarkasmoj kaj konfliktoj . . .

Sed la fidela disĉiplo ne ektimas.

La komercamo de la avareco ĉiam ankoraŭ skandaliĝos, kaj la venenita instuado daŭre restos ĉe sia esence propra malprudento. Sed li pluiros antaŭen, amante, ekzemplodonante kaj edukante kun la senmorta Liberiganto.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 7.)**

## Espero

“Ĉar ĉio, kio estas antaŭe skribita, estas skribita por nia instruado, por ke per pacienco kaj per konsolo de la Skriboj ni havu esperon.” -- *Paŭlo.* ( ROMANOJ, 15 : 4.)

La espero estas lumo por la kristano.

Ankoraŭ ne ĉiuj kapablas senti la sublimajn impetojn de la fido, sed la forto de la espero estas komuna trezoro.

Ne ĉiuj povas laŭvole proponi la panon por la korpo kaj la spiritan lecionon, sed neniu sur la Tero estas malpermesita dissemi la bonaĵojn de la espero.

La doloro plejofte skuas tiujn, kiuj restas en la “valo de ombro kaj morto”, kie la timo estigas konfliktojn kaj la aflikto perceptas la

“grincadon de dentoj” en la “ekstera malumo”, sed ekzistas ja la interna lumo, nome la espero.

La homa negativismo deklaras bankrotojn, subskribas atestojn pri neebleco, strekas nemalimplikeblajn labirintojn, sed de supre venas la espero, simile al la Suno, kiu, lumante en la alto, subtenas la novajn semejojn, instigas al aliaj celadoj, faras liberigajn ŝanĝojn kaj malkaŝas pli grandiozajn vidaĵojn.

La nokto atendas la tagon, la floro la frukton, la vermo la tempn venontan . . . La homon, eĉ se li dronas en nekredemo aŭ dubo, en plorado aŭ kordisŝiro, Dio ĉiam helpos, montrante al li la estontecon.

Jesuo, kiel Dia Majstro, scias, ke la lernantoj ne povos ĉiam ĝuste konduti, ke la eraroj estas parto de la evolua programo, kaj ke, ĝuste pro tio, la espero estas unu el la sublimaj kantoj de lia Evangelio de Amo.

Gravegaj estis ĝis nun niaj faloj sed ilin ĉiam superas la konfido de la Kristo. Ni ne perdiĝu en lamentado. Ĉiu momento estas tempo por aŭskulti Tiun, kiu eldiris la “Venu al mi . . .”

Ni ekstaru kaj marŝu, konvinkitaj pri tio, ke la Sinjoro havigis al ni la lumon de la espero, por ke ni briligu en ni mem la lumon de la spirita sanktiĝo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro “Vinberejo el Lumo”, ĉapitro 75.)**

## Lolo

“Lasu al ambaŭ kreski kune ĝis la rikolto ; kaj en la tempo de la rikolto mi diros al la rikoltistoj : Kolektu unue la lolon, kaj ligu ĝin en faskojn, por bruligi ĝin.” -- *Jesuo*. ( SANKTA MATEO, 13 : 30.)

Kiam Jesuo rekomendis la kunkreskon de la lolo kun la tritiko, li celis nenion alian ol elmontri la subliman, ĉielan toleremon en la kadro de la surteraj spertoj.

La Majstro neniam forprenis de la homoj la oportunajn okazojn por kreskado kaj moraliĝo, kaj ĉi-kampe eĉ la malbonon, kiu devenas de la

malnoblaj pasioj, lia senfina amo pacience ekzamenas, anstataŭ ĝin tuj estingi.

Necesas do konsideri, ke la lolo kreskas ne pro malzorgemo de la Dia Plugisto sed ja tial, ke la optimismo de la Ĉiela Semisto neniam perdas la esperon pri la fina venko de l' bono.

La kultivejo de la Kristo estas regiono de senĉesa, intensa aktiveco. Konsternaj taskoj agigas heroajn legiojn ; sed malgraŭ la sindono kaj la viglado de la laboristoj, elkreskas la lolo, minacante la laboron.

Jesuo tamen rekomendas la aplikon de defendaj procedoj bazitaj sur la spirita lernado kaj la favorkoreco. La tempo kaj la beno de la Sinjoro, per sia malrapida agado, aliigas la malnoblajn celadojn.

La ordinara homo ankoraŭ ne posedas taŭgan vidkapablon por distingi la renovigan agadon. Multajn dornajn aŭ senfruktajn kreskaĵojn aliigas, en ties esenca naturo, la amaj eliksiroj de la Administranto de la Kultivejo, kiu utiligas novajn inklinojn, malsamajn situaciojn, neatenditajn instigojn aŭ tenerajn, kortuŝajn prirespondecojn. Sed se, post la atendo kaj observado, alvenas la tempo de rikolto, tiam fariĝas necesa la forigo de la lolo, ligita en faskojn.

Ne samas la rikolto por ĉiuj semoj sur la Tero. Ĉiu speco havas sian tagon, sian sezonon.

Jen kial, ĉe la alveno de la ĝusta tempo, trudiĝas al ĉiu homo kaj al ĉiu kolektivo, la estingo de la lolo, en la okazo se montriĝis vanaj la renovigaj procedoj de Jesuo. Tiam oni vidas individuon aŭ popolon barakti en afliktoj kaj diversaj katastrofoj, kriegante alarmon kaj helpon, kvazaŭ ili troviĝus en la ombroj de fatala ŝiprompiĝo. Sed detruiĝas nur niaj ruinigas aŭ senutilaj akiroj. Kaj ĉar la lolo estas ligita en faskojn, tial aflikto neniam venas sola.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Vinberejo el Lumo", ĉapitro 107.)**

## Kuracado de la obsedoj

"Kunvenis ankaŭ en Jerusalemon la amaso el la ĉirkaŭaj urboj, portante malsanulojn kaj la turmentatajn de malpuraj spiritoj, kaj ĉiuj estis sanigitaj." -- ( LA AGOJ, 5 : 16.)

La kristana eklezio de la unuaj jarcentoj ne senmovigis la elaĉetajn ideojn de Kristo je la arĝentaĵoj kaj brilaj pompoj de la ekstera kulto.

Ĝi estis viva, plena de alvokoj kaj respondoj.

Nuntempe, simile al ĝi, la evangelia Spiritismo malfermas siajn bonfarajn pordojn al ĉiuj, kiuj suferas kaj serĉas vojon de savo.

Kurioze notindas, ke la vastega laborado de la nuntempaj spiritistoj, por helpo kontraŭ kompleksaj kaj dolorplenaj obsedoj, ja estis intime konata de la apostoloj. Ili moraligadis la konfuzitajn spiritojn,

renovigante per ekzemplo kaj instruado ne nur la suferantajn elkarniĝintojn, sed ankaŭ la malsanajn mediumojn, kiuj suferadis de ilia influo.

Ekde la unuaj horoj de sia moraliga tasko, la animo de la Kristanismo scias, ke senprudentaj nevideblaj estuloj vagadas sur la mondo, kaŭzante psikajn vundojn al tiuj, kiuj ricevas ilian influon, kaj ĝi ankaŭ ne ignoras la postulojn de la konverta kaj nobliga laborado, kiun ĝi devas realigi ; tamen, de multaj jarcentoj la religiaj dogmoj al ĝi malpermesis ĉian efikan servadon.

Sed jen, en plena nuneco, reaperas la primitivaj bildoj de la Bona Novaĵo.

Spiritaj estuloj, sensciaj kaj malfeliĉaj, havigas al si novan lumon kaj novan vojirplanon en la domoj de amo, kiujn la kristana Spiritismo starigas, venkante gravajn antaŭjuĝojn kaj kontraŭaĵojn.

La kuracado de la obsedoj ne estas do laboro stranga en niaj rondoj de renoviga fido. Ĝi estas nura daŭrigo de tiu penado, komencita ĉe la lumaj manoj de Jesuo, por savo de la ĉiuspecaj devojiĝintoj.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia" -- ĉapitro 175.)**

## Ni tion rigardu

"Ĉar Kristo sendis min ne por bapti, sed por prediki la Evangelion ; ne en saĝeco de vortoj, por ke la kruco de Kristo ne vantiĝu." -- *Paŭlo.* ( I KORINTANOJ, 1 : 17.)

Kiam ankoraŭ en la karno, ni ĝenerale sentas vantan plezuron ĉe tio, ke ni altiru la plejmulton da homoj al nia kredo.

Ni montriĝas senŝanĝe bonaj predikantoj kaj ege subtilaj en la elkovo de rezonoj, kiuj frakasus la vidpunkton de ĉiuj nepovantaj nin kompreni ĉe la senprokrasteco de sia vivbatalo.

Ĉe la unua malgranda triumfo, ni ekdiligentas en la konsultado al la sanktaj libroj, ne por akiri pli vastan inspiron, sed ja por esplori la homan

literon de la sanktaj skriboj, celante elstarigi la vundeblajn asertojn de niaj kontraŭuloj.

Se romkatolikoj, ni insistas ĉe la amikoj, ke ili vizitadu la meson kaj ricevadu la materiigitajn sakramentojn ; se adeptoj de la reformitaj eklezioj, ni postulas ĝeneralan ĉeeston al la ekstera kulto ; kaj se spiritistoj, ni provas plimultigi la seancojn por interilatoj kun la nevidebla mondo.

Tia penado ne povas ne esti laŭdinda laŭ kelkaj el siaj karakterizaĵoj, sed necesas rememori, ke la lernanto de la Evangelio, se li sincere penas kompreni Kriston, ja sentas sin profunde renoviĝinta je sia interna konduto.

Kiam Jesuo penetras homan koron, li transformas lin en vivan ateston pri la bono kaj sendas lin evangelizi siajn fratojn per la ofero de la propra vivo, kaj kiam homo atingas Jesuon, li ne plu haltas nure kaj simple ĉe la regiono de la brilaj vortoj, sed li vivas laŭ la principoj de la Majstro, donante la ekzemplon de laboro kaj amo, kiuj lumigas la vivon, por ke ne vantiĝu la gloro de la kruco.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia" -- ĉapitro 138.)**

## Ne nur tio

"Sed nun formetu ankaŭ la jenajn : koleron, pasian indignon, malicon, kalumnion, hontindan parolon el via buŝo." -- *Paŭlo.* ( KOLOSEANOJ, 3 : 8.)

Ĉe la religiaj aktivecoj, multaj kredas la personan reboniĝon de la adepto nur pro tio, ke li seninteresiĝis pri iuj materiaj havaĵoj.

Kiu disdonas grandan kvanton da vestaĵoj kaj nutraĵoj al senhavuloj, tiun oni rigardas renoviĝinta en la Sinjoro ; sed tio prezentas iun flankon de la vera transformiĝo, ne la tuton de ties karakterizaj trajtoj.

Estas homoj, kiuj seniĝas je mono por la bonfarado, sed kiuj ne cedas ĉe siaj opinioj cele al la sublima penado por la abnegacio.

Grandaj amasoj da disĉiploj deklaras sin pretaj al la farado de bono, tamen postulante, ke la bonfara servado plenumiĝu laŭ liaj kapricoj, ne laŭ la volo de Jesuo.

Ĉie oni aŭdas fervorajn promesojn pri fideleco al la Kristo, sed neniu atingos tiun celon ne plenumante la tutaĵon de la necesaj devoj.

Eta kalkuleraro povas kompromiti la ekvilibron de tuta konstruaĵo. Tial, se iu seniĝis je ia materia havaĵo por la bono de aliaj, li ankaŭ ne forgesu la devon forbati la malnovajn envolvaĵojn el malpardonemo, mania kapricemo, trorapida juĝo aŭ krima senpripenso, pro kiuj ni surmetas pezan maskon al la vizaĝo por ŝajnigi nin tiaj, kiaj ni ne estas.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 147.)**

## Sekso

"Mi scias, kaj konvinkiĝis en la Sinjoro Jesuo, ke nenio estas malpura per si ; sed por tiu, kiu opinias ion malpura, ĝi estas malpura." -- *Paŭlo.* ( ROMANOJ, 14 : 14.)

Kiam Paŭlo el Tarso tion rimarkigis al la Romanoj, li aludis pri nutrado, kiu tiam donis motivon por akraj disputoj inter nacianoj kaj judoj.

Nuntempe nutrado jam ne vekas danĝerajn polemikojn, sed ni povas preni la instruon de tiu paragrafo kaj ĝin apliki al aliaj regionoj de misa opinio.

Ni konsideru ekzemple la sekson. Neniu sektoro de la homa agado suferas pli gravajn atencojn kiel ĉi tiu. Ekstreme blindaj en spirito, la homoj ankoraŭ ne sukcesis rigardi la sekson, kiel unu el la plej sublimaj motivoj de sia ekzistado. La plej belaj realigoj en la surplaneda vivobatalo, kiaj la kuniĝo de animoj ĉe patreco kaj patrineco, la kreado kaj reproduktado

de la formoj, la transigado de la vivo kaj la multevaloraj instigoj al laborado kaj revirtiĝo estas donataj de la Sinjoro al la kreitoj pere de la seksaj emocioj ; sed tamen la homoj profanas la “sanktejon”, plenigante ĝiajn altarojn per la fantomoj de l’ diboĉo.

La sekso starigis la hejmon kaj kreis la nomon patrino, sed interŝanĝe la homa egoismo al ĝi donis absurdajn bestecajn praktikojn, estigante al si kruelan elprovadon.

La Patro donacis la sanktejon al la filoj, sed miskompreno estis ilia ofero. Ja tial dissemiĝas afliktaj kaj dolorplenaj amligiloj sur ĉiuj kontinentoj de la Tero.

Sed ankoraŭ la homo, droninta en bedaŭrinda devojiĝo, demandas pri seksa edukado, postulante koncernajn programojn. Jes, tiaj programoj eble estos utilaj, sed nur tiam, kiam disvastiĝos la sankta kompreno pri la dieco de la krea povo, ĉar tiel longe dum nestos malpuraĵo en la koro de tiuj, kiuj esploras aŭ instruas, same la metodoj estos nenio alia ol aferoj malpuraj.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro “Pano Nia”, ĉapitro 94.)**

## Jesuo por la homo

“Kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco.” -- *Paŭlo.* ( FILIPIANOJ, 2 : 8.)

La Majstro malleviĝis por servadi,
De brilego al mallumo . . .
De eterna aŭroro al nokto densa . . .
De steloj al la staltrogo . . .
De l’ infinito al limiteco . . .
De l’ gloro al la ĉarpentejo . . .
De l’ eminenteco al abnegacio . . .
De l’ anĝela dieco al la homa mizero . . .
De l’ kompanio de sublimaj genioj al kunvivado kun pekuloj . . .
De mondreganto al ĉies servanto . . .
De grandanima kreditoro al sklaveco . . .
De bonfaranto al persekutato . . .

De savanto al senhelpeco . . .
De sendito de amo al viktimo de malamo . . .
De elaĉetinto de la jarcentoj al arestito de la ombroj . . .
De ĉiela paŝtisto al premata ŝafo . . .
De potenca trono al martiriga kruco . . .
De la sankta vorto al angora silento . . .
De advokato de la kreitoj al sendefenda akuzito . . .
De amikaj brakoj al kuniĝo kun rabistoj . . .
De donanto de vivo eterna al kondamnito ĉe la valo de l' morto . . .

Li humiliĝis kaj malaltiĝis por ke la homo leviĝu kaj por eterne brilu!

Ho, Sinjoro, kion vi ne faris por ni, ke ni ekkonu la vojon al la Glora Reviviĝo en la Regno?

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 62.)**

## Evitu malpacon

"Kaj la servisto de la Sinjoro devas ne malpaci." -- *Paŭlo.* ( II TIMOTEO, 2 : 24.)

Deturnu vin de tiuj, kiuj strebas al malpaco en la servado al la Sinjoro.

Ili ne serĉas la dian lumon por siaj koroj, sed ja konkuras pri elstareco sur la kampo de la pasemaj konsideroj. Studante la sanktajn skribojn, ili celas ne la rimedojn necesajn al sia propra iluminado, sed ja paradi ĉe la malnobla kultado de sia personeco. Ili atakas tiujn, kiuj ne sekvas iliajn principojn, sin ĵetas kontraŭ la laboroj, kiuj ne troviĝas sub ilia rekta kontrolo, ne kunlaboras krom de alte malsupren, opinias utilaj nur tiujn taskojn, kiujn ili mem plenumas, amas la senfinajn diskutojn pri la ĝusta loko de komo kaj perdas longajn tagojn por malkovri la ŝajnajn kontraŭdirojn de la verkistoj, kiuj sin dediĉas al la idealo de Jesuo. Neniam ili havas tempon por la servoj de la kristana humileco, ĉar ilia intereso estas la persona elstareco. Ĉiam tre malinklinaj al la konjugado de la verboj helpi, pardoni kaj servi, ili konstante direktas sian atenton al la neperfekta flanko de la homaro, kontraŭ kiu ili tenas vipojn en la manoj laŭ sia malbona emo

al skurĝado. Ili malpacas pro ĉiu apartaĵoj de la evangelia laboro, kaj kiam montriĝas perspektivoj de edifa interkonsento, ili kreas novajn motivojn de perturbo.

Tiuj, kiuj aliĝas al la Savanta Evangelio pro amo al malpaco, apartenas al la vicoj de la plej grandaj kaj subtilaj malamikoj de la Regno de Dio.

La lernanto nepre bezonas vigli por ne fali en la frenezon de la mordantaj kaj senutilaj paroloj.

Ni estas vokitaj ne al kverelado sed ja al servado kaj lernado ĉe la Majstro ; ne al glorado de la "mi", sed al la plenumado de superaj decidoj por la konstruado de la Dia Regno en ni.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 98.)**

## Hodiaŭ

"Sed konsilu unu la alian ĉiutage, dum estas nomate hodiaŭ, por ke neniu el vi estu obstinigita per la trompeco de peko." -- *Paŭlo.* ( HEBREOJ, 3 : 13.)

La admono de la apostolo al reciproka, ĉiutaga konsilado postulas multan pripenson, por ke oni ne enlasu certajn dubojn.

Ni konsideru, ke Paŭlo atribuas neordinaran gravecon al la tempo nomata Hodiaŭ, elstarigante al ni la bezonon plivalorigi la rimedojn utiligatajn de niaj fortoj en la tago hodiaŭa.

Multaj kredas, ke por konsili siajn fratojn estas necese paroladi konstante kiel obstinaj disputemuloj.

Ni tamen konsentu ke admono nur konsistanta el vortoj nepre lasas malplenaĵon post si.

Kiel okazas sur la kampo de la fizikaj organizaĵoj, tiel same nenia spirita konstruaĵo stariĝos sen bazoj.

La "konsilu unu la alian" signifas admonon pli gravan, ol simplan alvokon al parolaj dueloj.

Invitoj kaj konsiloj montriĝas pli fortaj ĉe ĉies ekzemplado. Kiu vivas laŭ la noblaj principoj, al kiuj li sin donis en la mondo, kiu zorge plenumas siajn devojn kaj sincere faras la bonon, tiu admonas siajn fratojn en la vojon de altiĝo.

Ĝuste al tia ĉiutaga atesto nin alvokas la damaska konvertito. Nur per tiu konstanta ekzerciĝado por sia propra pliboniĝo la homo evitos la fatalajn trompojn.

Vi do ne obstinigu vian koron sur la vojo, kiun al vi difinis la Sinjoro por via elaĉeto, pliboniĝo kaj revirtiĝo. Memoru la gravecon de la tempo nomata Hodiaŭ.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 69.)**

## Prepariĝe

" . . . diras la Eternulo : Mi metos Miajn leĝojn en ilian internon, kaj sur ilia koro Mi ilin skribos, kaj Mi estos ilia Dio, kaj ili estos Mia popolo." -- *Paŭlo.* ( HEBREOJ, 8 : 10.)

Ni tradukos la Evangelion
En ĉiujn lingvojn,
Por ĉiuj kulturoj,
Laŭdante ĝian grandecon,
Reliefigante ĝian sublimecon,
Dissemante ĝian poeziecon,
Priparolante ĝian veron,
Interpretante ĝiajn instruojn,
Akceptigante ĝin al la intelekto,
Plibeligante la koron
Kaj rebonigante la menson,
Reformante leĝojn,

Perfektigante morojn
Kaj prilumante vojojn . . .

Sed venos iam la tempo,
Kiam la Bonan Novaĵon ni devos skribi en ni mem,

En la faldoj de la menso,
En la profundo de la brusto,
Per paroloj kaj agoj,
Principoj kaj idealoj,
Aspiroj kaj esperoj,
Gestoj kaj pensoj.
Ĉar, vere,
Se la Ĉielo konsenta al ni diskonigi ĝian Dian Mesaĝon en la mondo,
Ĝi ja postulos, ke ni iam fariĝu
Vivantaj tradukoj de la Evangelio sur la Tero.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 40.)**

## Salajroj

"Kaj estu kontentaj je via salajro." -- *Johano Baptisto.*
( LUKO, 3 : 14.)

La respondo de Johano Baptisto al la soldatoj, kiuj petis lin pri klarigoj, estas modelo de koncizeco kaj saĝo.

Multaj perdiĝas en neelireblaj labirintoj pro sia miskompreno pri la problemoj de laborpago en la ordinara vivo.

Estas laboristoj, kiuj postulas salajron de ministro, ne pensante pri la gravaj respondecoj, kiuj ne malofte faras el la mondaj administrantoj viktimojn de maltrankvilo kaj sendormeco, aŭ simple turmentatojn en reprezentadoj kaj bankedoj.

Estas kleraj homoj, kiuj vendas la hejman pacon kontraŭ la altigo de siaj salajroj.

Multaj personoj iras, de la junaĝo ĝis la korpa kadukeco, korpremataj kaj senkredaj, malsanaj kaj afliktitaj, pro sia nekontenteco pri la

monataj laborpagoj, kiujn la cirkonstancoj de la homa vojo al ili asignis laŭ la Nesondeblaj Decidoj.

Ne la altegaj salajroj aligos la homon al la diaj kadroj.

Se iu konscias siajn devojn, des malpli trankvila li fariĝas ju pli alte li estas salajrita.

La popola saĝo de antaŭ tre longe instruas, ke por granda ŝipo, granda tempesto. Servisto kontenta pri sia salajro elmontras altan komprenon pri la justeco de la Ĉiopova.

Vi do, antaŭ ol taksi vian surteran laborpagon, kutimiĝu valorigi la donojn de la Ĉielo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Pano Nia", ĉapitro 5.)**

## Antaŭ Dio

"Patro nia . . ." -- *Jesuo.* ( SANKTA MATEO, 6 : 9.)

Por Jesuo la ekzisto de Dio ne estas kaŭzo de malpacoj kaj kvereloj.

Li ne esploras la naturon de la Eternulo.

Li ne demandas, kie Dio loĝas.

Li ne vidas Lin, kiel obskuran, senpersonan kaŭzon de la Universo.

Li simple nomas Lin "nia Patro".

En la horoj de laboro kaj preĝo, de ĝojo kaj sufero, li sin turnas al la Superega Sinjoro kiel amema kaj fidoplena filo.

La Majstro montras al ni la sintenadon, kiun ni prenu antaŭ Dio.

Nek nekonvena esplorado.
Nek senpripensa demandado.
Nek malsaĝa postulemo.
Nek malrespekta difino.

Kiam vi preĝos, aliru la sekretan ĉambron de la konscienco kaj konfidu vin al Dio kiel al nia Patro Ĉiela.

Estu sincera kaj fidela.

Al Li ni lojale submetiĝu kiel bezonantaj filoj.

Ne demandu, ĉu Dio estas fokuso generanto de mondoj, aŭ forto, kiu disradiadas vivantaĵojn.

Ni ankoraŭ ne posedas intelekton kapablan respeguli Lian grandecon, sed ni portas koron, kiu povas senti Lian amon.

Ni do serĉu Nian Patron super ĉio, kaj Dio, Nia Patro, aŭskultos nin.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 164.)**

## Antaŭ la amo

"Kiu amas sian fraton, tiu restas en la lumo, kaj en li ne estas faligaĵo." -- *Johano.* ( I JOHANO, 2 : 10.)

Kiu amas la proksimulon, tiu scias super ĉio kompreni. Kaj kiu komprenas, scias purigi siajn okulojn kaj orelojn el la venena visko de la skandalo, por helpi anstataŭ akuzi aŭ malutili.

Necesas teni la koron sub la lumo de la vera frateco, por rekoni, ke ni estas fratoj unuj al la aliaj, filoj de unu sola Patro.

Dum ni restas en la malluma stadio de la ekskluziveca sinamo, ni enkarceriĝas en egoismon, postulante la amon de aliuloj. Ĉe tiu bedaŭrinda sinteno, ni emas ami neniun krom ni mem, prenante la similulojn kiel ilojn por nia propra plezuro.

Sed se ni efektive amas nian vojkunulon, tiam la pejzaĝo ŝanĝiĝos, ĉar la hela lumo de la amo banos al ni la vidadon.

Vi do amu, ĉar kiel koto ne ofendas lumon, tiel same ofendo ne trafos vin plu.

Sciante, ke mizero estas frukto de nescieco, vi helpos la viktimon de la malbono, ĉar en li vi rigardos vian fraton mem, bezonantan apogon kaj komprenemon.

Vi lernos aŭskulti sen indigno, eĉ se la krimo trafos vian orelon, kaj vi provos helpi la kontraŭulon, eĉ se vi portas ŝiritan koron, ĉar la pardono kun la absoluta forgeso de la ricevitaj batoj spontane leviĝos en via spirito, same kiel la toleremo estas tute natura ĉe la fonto akceptanta en sian sinon la ĵetitajn ŝtonojn.

Amu kaj vi komprenos.

Komprenu kaj vi, kun ĉiu tago, servos ĉiam pli kaj pli, ĉar tiam vi restos sub la gloro de la lumo, neatingebla por ĉia atako de l' tenebro.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 159.)**

## Infanoj

"Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj . . ."
-- *Jesuo.* ( SANKTA MATEO, 18 : 10.)

Kiam Jesuo al ni rekomendis ne malestimi la malgrandulojn, li atendis de ni ne nur zorgajn aranĝojn por pano kaj vesto.

Ne sufiĉas nutri infanajn buŝojn malsategajn aŭ ŝirmi frostiĝintajn korpetojn. Estas nepre necesa la morala ŝirmejo, kiu certigus al la renaskiĝanta spirito la laboretoson ne malhaveblan por lia puriĝo.

Multaj gepatroj garantias al siaj filetoj materian komforton, sed pelas iliajn animojn en bedaŭrindan forlasitecon.

La surstrata vagabondeco produktas krimulojn, kies vojfino estas restado en karcero aŭ frenezulejo, sed la spirita malzorgemo en la hejmo generas demonojn de perverso kaj frenezo, kiuj multokaze, subtenataj de

mono aŭ socielstaraj postenoj, trapasas longajn pecojn de la jarcento dissemante mizeron kaj suferon, ombron kaj ruinon ĉe bedaŭrinda senpuneco antaŭ la surtera justico.

Vi do ne malzorgu la infanon, ĝin forlasante al la impulsoj de la animala naturo.

Memoru, ke ni ĉiuj troviĝas en proceso de edukado kaj reedukado antaŭ la Dia Majstro.

La manĝaĵo havas sian gravecon en la disvolviĝo de la persono, sed ni ne povas forgesi, ke "ne per la pano sole vivas homo".

Ni zorgu la spiritan nutradon de la geknaboj per niaj konduto kaj ekzemploj, oportunokazaj admonoj kaj korektoj, ĉar nei moralan helpon al la infano en ties hodiaŭaj taskoj, estos ĝin kondamni al memmalŝato en la laboroj, kiujn ĝi morgaŭ devos plenumi.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 157.)**

# Parolo

" . . . paroladon sanan, nekondamneblan ; por ke la kontraŭulo hontu, havante nenion malbonan diri kontraŭ ni."
-- *Paŭlo.* ( TITO, 2 : 8.)

Per la parolo la homo sin helpas aŭ malhelpas.

Eĉ se nia interno restas nebuligita per problemoj, ne decas, ke nia parolo nubiĝu aŭ senbridiĝu kontraŭ aliuloj.

Ĉiu portas sian enigmon, sian bezonon, sian doloron, kaj ne estas juste pligrandigi la afliktojn de la najbaro, lin ŝarĝante per niaj zorgoj.

La eksterigo de plendo senkuraĝigas, vorto malĝentila estas kvazaŭ vergobato, la rimarko de klaĉemulo konfuzas.

Per misa konduto kontraŭ aliulaj eraroj ni malproksimigas la veron for de ni.

Per malnobla parolesprimo ni forĵetas la benon de l' amo, kiu nin plenigus per vivoĝojo.

Ni havu la necesan kuraĝon mem estingi la radiojn de niaj senbridaj sentoj kaj deziroj.

La parolo estas kanalo de la "mio".

Tra la langovalvo niaj pasioj eksplodas aŭ niaj virtoj etendiĝas.

Ĉiufoje kiam ni elĵetas eksteren niajn proprajn vortojn, tiam ni eligas fortojn, kiuj detruas aŭ konstruas, kiuj ruinigas aŭ restaŭras, kiuj vundas aŭ konsolas.

Niaopinie parolo konsistas el tri esencaj elementoj : esprimo, maniero kaj voĉo.

Se ni ne klarigas la frazon, ne rafinas la manieron kaj ne edukas la voĉon, laŭ la situacioj, tiam ni riskas perdi la plej bonajn okazojn por pliboniĝo, komprenado kaj altiĝo.

Paŭlo el Tarso liveras konvenan recepton al la lernantoj pri la Evangelio.

Nek tro dolĉa nek tro amara parolo. Ĝi ne estu tro mola por ne forpeli la konfidon, nek akra aŭ vunda por ne rompi la simpation, sed ja "parolado sana, nekondamnebla, por ke la kontraŭulo hontu, havante nenion malbonan diri kontraŭ ni".

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva fonto", ĉapitro 43.)**

## Eduku

"Ĉu vi ne scias, ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio?" -- *Paŭlo.* ( I KORINTANOJ, 3 : 16.)

En la eta semo kuŝas la ĝermo de la bonfara trunko.
En la koro de la tero troviĝas la melodioj de la fonto.
En la ŝtona bloko estas ĉefverkoj de la statuarto.
Sed la fruktarbejo postulas diligentan zorgadon.
La kristala fluakvo petas akveduktojn por transportiĝi neinfektita.
La skulptura juvelo atendas miraklojn de la ĉizilo.
Ankaŭ la spirito portas en si la Dian gemon.
Kiel Dio estas en ni, tiel ankaŭ ni estas en Dio.

Sed, por ke la dia lumo elvidiĝu el la homa mallumo, estas necese, ke la edukaj procedoj de la vivo prilaboru nin sur la ŝtonplena vojo de la jarmiloj.

Nur koro nobliĝinta per plej vasta kompreno povas elverŝi la sanktigan heroecon.

Nur el kulturita cerbo povas fonti lumaj pensoformoj.

Nur la spirita grandeco povas naski la pripensitan parolon, la subliman vorton kaj la balzaman voĉon.

Ni komprenu doloron kaj laboron kiel ĉielajn artistojn por nia cizelado.

Eduku, kaj vi transformos senraciecon en inteligentecon, inteligentecon en homecon kaj homecon en anĝelecon.

Eduku, kaj vi konstruos paradizon sur la Tero.

Se ni scias, ke la Sinjoro loĝas en ni, ni perfektigu nian vivon por lin elmontri al la homoj.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 30.)**

## Neniu vivas al si

"Ĉar neniu el ni vivas al si mem . . ." -- *Paŭlo.* ( ROMANOJ, 14 : 7.)

La arbo, kiun vi plantas, kontentigos ne nur vian malsaton, sed ankaŭ la bezonon de multaj.

La lampo, kiun vi ekbruligas, lumigos la vojon ne nur al viaj piedoj, sed ankaŭ al viaj vojaĝkunuloj.

Kiel akvoflueto efikas sur la teron, tiel ankaŭ viaj decidoj influas aliulajn decidojn.

Miloj da okuloj observas viajn paŝojn, miloj da oreloj aŭskultas vian voĉon kaj miloj da koroj ricevas viajn instigojn al bono aŭ malbono.

"Neniu vivas al si . . ." -- asertas la Dia Mesaĝo.

Ĉu ni volas aŭ ne volas, estas preskribite en la Leĝo, ke nia vivo apartenu al la vivo de tiuj ĉirkaŭ ni.

Ni vivas por niaj familianoj, niaj amikoj, niaj idealoj . . .

Eĉ la malsocietema avarulo, sin opinianta tute sola, vivas por la oro aŭ la havaĵoj, kiujn li iam redonos al aliaj vivoj, superaj aŭ malsuperaj, al kiuj lia trezoro estos forportita de la morto.

Komprenante tian realaĵon, atentu vian propran vojon.

Sentante, vi pensas.

Pensante, vi realigas.

Kaj ĉio, el kio konsistas viaj verkoj, per viaj intencoj, paroloj kaj agoj, estos efiko de via animo, kiu vin helpos liberiĝi al la gloro de la lumo, aŭ plilongigos vian malliberecon por suferado en la ombroj.

Viglu do super via intima mondo kaj faru, ankoraŭ hodiaŭ, la bonon, kiun vi povas, ĉar, laŭ la saĝa instruo de la apostolo Paŭlo, "neniu vivas al si".

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 154.)**

## Ni observu nin

"Kiu diras, ke li restas en li, tiu mem devus tiel iradi, kiel li iradis." -- *Johano.* ( I JOHANO, 2 : 6.)

Estas tiuj, kiuj asertas vivi laŭ la boneco de Jesuo sed sin ne ĝenas ataki siajn similulojn per klaĉado kaj kruelaĵoj.

Estas tiuj, kiuj deklaras kompreni la optimismon de la Dia Majstro, sed kiuj senhezite enfalas la ombrojn de pesimismo kaj malespero.

Estas tiuj, kiuj proklamas la fratecon de la Kristo, instigante al apartiĝo kaj malkonkordo.

Estas tiuj, kiuj gloregas la senĉesan laboron de la Sinjoro por disvastigado de bono, kuŝante sur la hamako de mallaboremo kaj nenifarado.

Estas tiuj, kiuj laŭdas la simplecon de la Eterna Amiko, komplikante ĉiujn problemojn sur la vojo.

Estas tiuj, kiuj gloras la paciencon de la Sublima Instruanto, kroĉiĝante al la ŝtono de agresemo kaj netoleremo.

Se ni deklaras nin lernantoj de la Evangelio, ni atentu niajn proprajn paŝojn.

Ni memoru, ke la nomo de Jesuo estas deponita en niaj manoj.

Tiel komprenante, ni alkonformiĝu al la Dia Modelo.

Kiam la Apostolo deklaras, ke "Kiu diras, ke li restas en li, tiu mem devus tiel iradi, kiel li iradis" -- li kompreneble volas diri : "kiu sin proklamas sekvanto de Jesuo, tiu certe devus imiti lian konduton, penante vivi en la ekzemplado, en kiu la Majstro vivis".

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 167.)**

## Ni serĉu fervore

"Sed vi deziru forte la pligrandajn donacojn. Kaj ankoraŭ pli preferindan vojon mi montras al vi." -- *Paŭlo.* ( I KORINTANOJ, 12 : 31.)

La opinio, ke por pli bona servado al la Dia Revelacio oni devas ne instruiĝi nek perfektiĝi, tre klare montriĝas kiel provo sankcii mallaboremon, ol kiel komenca ekzercado de humileco.

La vivo estas altgrada kurso por perfektiĝo per penado kaj lukto, kaj se eĉ ŝtono devas sperti cizeladon por respeguli la lumon, kion diri pri ni mem, jam de nun vokitaj eksterigi niajn diajn kapablojn?

Neniu ĉesigu la benatan laboron de la propra edukado je preteksto de kunlaborado kun la Ĉielo, ĉar la progreso estas vagonaro kun nehaltigeblaj radoj, kiu forlasas malantaŭe tiujn ribelantajn kontraŭ la imperativoj de la antaŭo.

Estas nepre necese antaŭeniri, ja plibonigante ĉion ĉirkaŭe, ĉar la Evangelio sankcias nenian senlaboran atendadon.

La parolo de Paŭlo estas ege signifoplena.

Skribante al la korintanoj, la apostolo al la nacianoj ilin admonas al fervora serĉado de pli bonaj donoj.

Nepre necesas, ke ni inklinu al la akirado de pli noblaj ecoj de la intelekto kaj de la koro, sublimigante nian nemorteman individuecon.

Kleriĝo kaj sanktiĝo, pere de laboro kaj frateco, elstaras kiel devo por ĉiuj homoj.

Perfektiĝado estas al ĉiuj komuna celo.

Ni fervore serĉu la plialtigon de ni mem, markante ĉie ajn nian ĉeeston per la beno de la servado al ĉiuj, kaj tuj kiam ni integriĝos al la nobla laboro per senĉesa, persona agado por la bono, tiam la Plejalto vidigos al ni pli lumajn suprenirajn vojojn.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 54.)**

## Ĉe la komuna penado

"Ĉu vi ne scias, ke malmulto da fermentaĵo fermentigas la tutan mason?" -- *Paŭlo,* ( II KORINTANOJ, 5 : 6.)

Ni ne forgesu, ke niaj pensoj, paroloj, sintenadoj kaj agoj efikas kiel mensaj modliloj sur niajn kunvivantojn, kaj ke reciproke ni ĉiutage ricevas la aliulan influon ĉe la konstruado de nia propra destino.

Kaj ĉar ni ricevas laŭ tio, kiel ni altiras kaj rikoltas, ni tial sciu doni tion plej bonan el ni, por ke la aliaj reciproke proponu la plej bonan el si mem.

Ĉiuj viaj pensoj efikas sur la mensojn de viaj kunuloj.

Ĉiuj viaj paroloj estigos impulsojn en viaj aŭskultantoj.

Ĉiuj viaj skriboj naskos imagojn en viaj legantoj.

Ĉiuj viaj agoj estas vivaj formoj, influantaj viajn rondanojn.

Kiom ajn vi provos izoliĝi, vi ĉiam restos vivanta peco de la ekzistadmaŝino.

La radoj sidantaj sur la grundo garantias la komfortecon kaj la sekurecon de la veturilo.

Ni estas skipo da laboristoj agantaj laŭ perfekta interdependeco.

El la kvalito de nia penado venas la sukceso aŭ la fiasko de la tuto.

Nia vivo, kia ajn la batalkampo, estas granda metiejo de modlado.

Ni sklaviĝos al la mallumo aŭ liberiĝos por la gloro de l' lumo laŭ la vivaj modliloj produktitaj de niaj direktivoj kaj faroj.

Ni memoru pri honesteco kaj nobleco ĉe la plej sensignifaj agoj, kaj denove prezentu al ni la lecionon de la Evangelio:

"Malmulto da fermentaĵo fermentigas la tutan mason."

Ni faru el nia vojo benatan fonton de laboro kaj frateco, helpo kaj espero, por ke nia Laborplena Hodiaŭo transformiĝu en Dian Morgaŭon.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 161.)**

## Problemoj de la amo

" -- ke via amo abundu ankoraŭ plie kaj plie, en scio kaj ĉia saĝo." -- *Paŭlo.* ( FILIPIANOJ, 1 : 9.)

La amo estas la dia forto de la Universo.

Necesas, tamen, ke ni multe viglu, por ne deklini ĝin de la ĝusta apliko.

Kiam homo sin absolute dediĉas al siaj pereemaj kasoj, tiu energio en lia koro nomiĝas "avareco"; kiam li sin turmentas ekskluzive pri la gardo de siaj havaĵoj, juĝante sin la centro de la vivo en sia loko, tiu sama forto aliformiĝas en "egoismon"; kiam li trovas motivojn nur por sin laŭdi pro tio, kio li estas, kion li sentas kaj kion li faras, kun evidenta malŝato kontraŭ aliulaj valoroj, tiu sento lin superreganta estas nomata "envio".

Skribante al la amoplena Filipiana komunumo, Paŭlo formulas tre gravan admonon. Li asertas, ke “la amo devas abundi ankoraŭ plie kaj plie, en scio kaj saĝo, por ke la disĉiplo povu aprobi la plej bonajn aferojn”.

Ni do instruiĝu, por scii.

Ni edukiĝu, por distingi.

Intelekta kulturo kaj morala pliboniĝo estas imperativoj de la vivo, ebligantaj al ni manifesti la amon, sub la instigo de l' perfektiĝado, kiu nin proksimigas al Dio.

Ni sekvu la apostolan konsilon kaj kresku en spiritaj valoroj por la eterna vivo, ĉar multfoje nia amo simple signifas “voli”, kaj nur per volo oni povas senpripense difekti la plej belajn bildojn de la vivo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro “Viva Fonto”, ĉapitro 91.)**

## Konservu la paciencon

“Ĉar vi havas bezonon de pacienco, por ke, plenuminte la volon de Dio, vi ricevu la promeson.” -- *Paŭlo.* ( HEBREOJ, 10 : 36.)

Kredeble vi de longe eltenas turmentatan esperon.

Vi deziras, ke la mondo tuj respondu al viaj sopiroj, donante ŝirmon al via koro; sed kian pacon vi ĝuus el la ŝajna triumfo de viaj revoj, sen elpagi la ŝuldojn, kiuj vin katenas al la problemo kaj al la malfacilaĵo?

Kiel ripozi antaŭ la postulo de kreditoro?

Ĉu krimulo trankvilos antaŭ ol juste ripari sian kulpon?

Vi scias, ke la destino efektivigos viajn projektojn pri feliĉo, ke fine la venko estos krono por via batalado, sed vi rekonas vin malliberigita ĉe la rondo de iaj devoj.

La hejmo transformita en forĝejon de angoroj . . .

La servoloko, en kiu vi suferas la enŝoviĝon de kalumnio aŭ la baton de krueleco . . .

La parenco, al kiu vi ŝuldas respekton kaj amon, sed de kiu vi ricevas malŝaton kaj sendankecon . . .

La reto el obstakloj . . .

La konspirado de la ombroj . . .

La senkaŭza persekutado, la korpa malsano, la trudo de la medio . . .

Se la provoj malliberigas vin inter la stringaj kradoj de la plenumendaj devoj, estu pacienca kaj plenumu ilin! . . .

Ne forlasu la renovigan laboradon!

Memoru, ke la volo de Dio ĉiumomente manifestiĝas en la ĉirkaŭantaj cirkonstancoj! Ni reguligu niajn kontojn kun la ombro, por ke la Lumo favoru nin!

Estas vere, ke ni ĝuos la konkretigon de niaj projektoj pri feliĉo, sed antaŭe necesas, ke ni pacience likvidu la ŝuldojn faritajn kontraŭ la Leĝo.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 129.)**

## Neniam laciĝi

" . . . Oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi." -- ( SANKTA LUKO, 18 : 1.)

Ne permesu, ke la eksteraj problemoj, eĉ tiuj de la korpo, nekapabligu vin por la laboro de via spirita progreso.

Dum vi iros sur tia kampo de ekzercado, kiel la Terkrusto, vi ĉiam alfrontos la malhelpon kaj la doloron.

Donita leciono malfermas la vojon al novaj lecionoj.

Post enigmo solvita, sekvas novaj enigmoj.

Ne alia povas esti la funkcio de lernejo, ol instrui, ekzerci kaj perfektigi.

Plenigu do vian koron per trankvilo kaj kuraĝo, en ĉiuj situacioj.

Vi estas lokita inter mil obstakloj de stranga naturo por tio, ke, venkante eksterajn embarasojn, vi lernu superi viajn proprajn limojn.

Tiel longe dum la surtera homaro ne adaptiĝos al la nova lumo, vi vivos inter maltrankviligaj larmoj, senpripensaj agoj kaj mallumaj sentoj.

Estu preta ĉiam senkulpigi kaj helpi, por ke vi ne perdu la gloran okazon de via spirita kreskado.

Memoru ĉiuj afliktojn, kiuj en la mondo ĉirkaŭsieĝis la kristanan spiriton, ekde la veno de la Sinjoro.

Kio fariĝis el la Sinedrio, kiu mortkondamnis la Ĉielan Amikon?

El la Romanoj, vantemaj kaj konkeremaj?

El la persekutintoj de la naskiĝanta Bona-Novaĵo?

El la militistoj, kiuj pro la Evangelio fluigis mallumajn riverojn el ŝvito kaj sango?

El la ruzaj princoj, kiuj bataladis kaj negocadis en la nomo de la Krucumita Renoviganto?

El la mallumoj de la Mezepoko?

El la ĉiaspecaj politikistoj kaj inkvizitoroj, kiuj vundis en la nomo de la Altega Bonfaranto?

Forĵetitaj de la tempo en la abismojn el cindro, ili fortikigis kaj plifirmigis la luman piedestalon, sur kiu brilegas la figuro de la Kristo, ĉiam pli glora en la regado de la jarcentoj.

Centru vin en la klopodado helpi por la komuna bono, irante kun via kruco renkonte al la dia releviĝo. Ĉe la konsternaj surprizoj de la marŝo, rememoru, ke antaŭ ĉio necesas ĉiam preĝi, laborante, servante, lernante, amante, kaj neniam laciĝi.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 61.)**

## Atentu nun

"Atentu nun vi, kiuj diras . . . morgaŭ . . ." ( JAKOBO, 4 : 13.)

Nun estas la decida momento por fari bonon.
Morgaŭ, probable . . .
La amiko estos malaperinta.
La malsano estos pli grava.
La vundo montriĝos pli vasta.
La problemo fariĝos pli komplika.
La okazo por helpo ne sin denove prezentos.

La bona grajno semita en la nuno estas garantio de valora rikolto en la estonteco.

La utila parolo, senprokraste eldirita, ĉiam estos lumo en la kadro de via vivo.

Se vi deziras pardonon pri iu via kulpo, turnu vin nun al tiuj, kiujn vi ofendis kaj montru al ili vian strebon al reĝustiĝo.

Se vi intencas helpi vian proksimulon, faru ĝin senprokraste, por ke la beno de via frata servado respondu al la bezonoj de via frato kun la dezirinda efikeco.

Ne preterdormu la eblecon fari tion plej bonan.

Ne restu ĉe senfara atendado, se vi povas kontribui por la ĝojo kaj la paco.

Malfrua regalo havas guston de galo.

"Atentu nun" -- admonas la Evangelio per la apostola parolo.

Prokrasti la bonon, kiun ni povas efektivigi, estas malŝpari la tempon kaj ŝteli de la Sinjoro.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 119.)**

## Malfermitaj tomboj

"Malfermita tombo estas ilia gorĝo." -- *Paŭlo.* ( ROMANOJ, 3 : 13.)

Parolante pri la spiritoj devojiĝintaj de la lumo, Paŭlo asertis, ke ili havas gorĝon similan al malfermita tombo, kaj en tiun bildon oni povas enkadrigi multajn samkredantojn, kiuj deflankiĝas de la Vera Vojo de la Evangelio sur la danĝerajn irejojn de la krima individuismo.

Apenaŭ ili sin lokis en la malluma regno de la "mi", forgesante la devojn nin ligantajn al la Dia Universala Regno, jen ilia gorĝo aliformiĝas en veran malfermitan tombon. Simile al vazo plena de koto, ili lasas elflui la tutan galon elbordiĝantan el sia interno, kaj sin ekskluzive alagordas al la difektoj ankoraŭ ĝenantaj najbarojn, amikojn kaj kunulojn.

De la bonvolemaj vivkunuloj ili nur rigardas la neperfektaĵojn, la malfortaĵojn, la malsanajn inklinojn.

Ĉe la ekzameno de aliulaj vundoj, ili anstataŭigas la kuracadon per teksado de longaj komentarioj.

Altvaloran tempon ili perdas en longaj, malicaj konversacioj por nigrigi aliulajn intencojn.

Sian imagon ili ŝtopas per malnoblaj bildoj sub la inspiro de suspektemo kaj mensa malekvilibro.

Ili precipe plendas pri ĉiuj kaj ĉio.

Ili elsendas narkotajn emanaĵojn el malsincero, estigante ĉe sia paso senkuraĝecon kaj malkonfidon al la prospero de l' revirtiĝo, brulsekigante la florojn de la espero kaj pereigante la nematurajn fruktojn de la karitato.

Tiaj lernantoj, profunde malfeliĉaj pro sia konduto, efektive montriĝas al ni kiel malfermitaj tomboj . . .

Ili elspiras ruinojn kaj mortigajn toksaĵojn.

Kiam vi do devojiĝos en la glitigan terenon de plendoj kaj akuzoj, preskaŭ ĉiam senpravaj, rekonsideru viajn spiritajn paŝojn kaj rememoru, ke nian gorĝon ni devas dediĉi al la bono, ĉar nur tiel per ĝi esprimiĝos la sublima parolo de la Sinjoro.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 51.)**

## Renaskiĝu nun

"Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio." -- *Jesuo.* ( SANKTA JOHANO, 3 : 3.)

En ĉi tiu rilato la Naturo mem prezentas altvalorajn lecionojn. La jaroj intersekvas sin laŭ matematika precizeco, sed ĉiam novaj estas la tagoj. Kaj disponante en ĉiu jaro tricent sesdek kvin okazojn por lernado kaj rekomenco, kiom da oportunoj por morala renoviĝo la homo trovos dum la benata tempo de unu ekzistado?

El la pasinteco vi konservu tion bonan kaj justan, belan kaj noblan, sed ne retenu ties rubojn kaj ombrojn, eĉ se maskitaj per ĉarma kovro.

Faru vi mem, sur la kampo de via iniciativo por praktikado de la vera frateco, tiun laboron, kiun pro neglektemo vi nepre ĵetus sur la ŝultrojn de viaj bonfarantoj kaj spiritaj amikoj.

Ĉiu nova horo povas esti portanto de reĝustigo.

Se al vi eble, ne prokrastu teksi la ligilojn de amo kaj paco, kiujn vi povas en la nuno, kiel anstataŭon por la pezaj katenoj de malamo.

Ne estas facile rompi kun malnovaj reguloj de la mondo, nek malstreĉi la koron favore al tiuj, kiuj vundas nin. Sed la plej bona antidoto kontraŭ la toksaĵoj de la malsimpatio ja estas nia bonvolemo por tiuj, kiuj nin malamas aŭ nin ankoraŭ ne komprenas.

Dum ni restas en la defenda fortikaĵo, la kontraŭulo zorgas pri la plimultigo de la municio, sed se ni venas en la arenon, sentimaj kaj serenaj, elmontrante novajn inklinojn en la batalo, tiam la ideo pri interkonsento anstataŭas, en ni kaj ĉirkaŭ ni, la malluman fermentadon de milito

Ĉu iu vin ofendas? Rekomencu la klopodon por la bonaj interrilatoj.

Ĉu iu ne komprenas vin? Persistu en la elmontro de viaj plej noblaj intencoj.

Lasu vin renaskiĝi, ĉiun tagon, en la senĉesa, kristalpura fluo de bono.

Ne forgesu la aserton de la Majstro : -- "Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio".

Renaskiĝu nun en viaj intencoj, decidoj kaj agoj, laborante por transpasi la obstaklojn kaj antaŭcertigante, en la tempo, la venkon super vi mem . . .

Pli bone helpi hodiaŭ, ol esti morgaŭ helpata.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 56.)**

## Ni serĉu la ekvilibron

"Kiu diras, ke li restas en li, tiu mem devus iradi, kiel li iradis." -- *Johano.* ( I JOHANO, 2 : 6.)

Kvankam vi devas iradi sentime, tamen ne kuniĝu kun la senprudenteco, pretekste ke vi amas la kuraĝon.

Se ni nin dediĉas al la Evangelio, ni do penu agi laŭ la ekzemploj de la Dia Majstro, kiuj neniel instigas al trobraveco.

Jesuo reliefigas la devon konstrui la Regnon de Dio, sed ne oferas la aliulajn interesojn al trofruaj verkoj.

Li rekomendas la sincerecon de la "jes, jes -- ne, ne", sed ne lasas sin konduki de l' ofenda krudeco.

Li atentigas pri la moralaj ruinoj de la dogmema fariseismo, sed respektas la Leĝon de Moseo.

Li relevas Lazaron el la tombo, sed ne intencas lin definitive liberigi de la karna morto.

Li konscias sian de supre ricevitan povon, sed ne malŝatas la politikan aŭtoritaton, kiu devas administri la bezonojn de la popolo, kaj li instruas, ke oni devas redoni "al Cezaro la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio".

Arestite kaj kondamnite al torturo, li ne perdiĝas en parolminacado, kvankam li scias la sindonon, kun kiu lin sekvas la anĝelaj estuloj.

Ni sekvu la Dian Modelon kaj Lin ja ne forgesu, plenumante lojale kaj kuraĝe nian taskon, sed ni evitu la nenecesan tromaltimon, kiu egalas danĝeran facilanimecon.

Timema koro glaciigas la laboron.

Temerara koro forbruligas ĉian servon.

Ni do serĉu la ekvilibron kun Jesuo, kaj ni tiel nature evitos la ekstremismon, kiu ĉiam estas la malluma signo de malkonkordo aŭ de perforto, de malordo aŭ de morto.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 134.)**

## En la kulto al preĝado

"Kaj post ilia preĝado skuiĝis la loko, en kiu ili kolektiĝis, kaj ili ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito." ( LA AGOJ, 4 : 31.)

Ĉiu el ni disĵetas ĉirkaŭen fortojn kreivajn aŭ detruajn, agrablajn aŭ malagrablajn por la privata rondo, en kiu li moviĝas.

La arbo efikas sur nin per la subtila substanco de siaj emanaĵoj.

La araneo vivas en sia propra reto.

La abelo povas konstante flugadi, sed ĝi ripozas ne aliloke ol en la fakoj de sia abelujo.

Tiel same ankaŭ la homo vivas en la mezo de siaj propraj mensaj kreaĵoj.

Niaj pensoj estas muroj, interne de kiuj ni enfermiĝas, aŭ flugiloj, per kiuj ni progrese ascendas.

Kiel vi pensas, tiel vi vivos.

Nia intima vivo -- nia loko.

Por ke ni ne perturbu la leĝojn de la Universo, la Naturo donas al ni la benojn de la vivo nur konforme al niaj konceptoj.

Enfermiĝu, kaj vi rigardos la limon de ĉio, kio ĉirkaŭas vin.

Eksteriĝu el vi mem, kaj vi konscios la nemezureblon de ĉio, kio ekzistas.

Por ke ni altiĝu kun ĉiuj elementoj de nia rondo, ni ne konas alian rimedon krom la preĝo petanta pri lumo, amo kaj vero.

La preĝo, esprimanta ardan aspiron al spirita altiĝo pere de scio kaj virto, estas la forto, kiu prilumas la idealon kaj sanktigas la laboron.

La Agoj rakontas, ke, post la preĝado de la apostoloj, skuiĝis la loko, en kiu ili kolektiĝis, kaj ili pleniĝis de la Sankta Spirito : lumiĝis ilia strebo al frateco, altiĝis iliaj mensoj unuiĝintaj por superaj celoj, kaj sanktiga energio feliĉigis al ili la animon.

Ne forgesu do, ke la kulto al la preĝado estas decida progresrimedo. La preĝo kun ĉiu tago renovigos vin por la laboro de la Sinjoro, eĉ se vi tion ne konscias mem.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 149.)**

## Ni konservu fidelecon

"Cetere, ĉi tie estas postulate ĉe administrantoj, ke oni troviĝu fidela." -- *Paŭlo.* ( I KORINTANOJ, 4 : 2.)

Ni faru en ĉiu tago tion plej bonan, kion ni povas.

Se vi administras, estu justa en la distribuado de laboro.

Se vi leĝdonas, estu fidela al ĉies bono.

Se vi dissemas la donacojn de la fido, ne malzorgu tiujn plej proksimajn al vi.

Se vi instruas, komprenebligu vian lecionon.

Se vi dediĉas vin al la arto, ne difektu la dian inspiron.

Se vi kuracas, ne malŝatu la malsanulon.

Se vi konstruas, konsideru la sekurecon.

Se vi plugas, plenumu ĝin kun ĝojo.

Se vi kunlaboras por la urbpurigado, rigardu la higienon kiel vian mision.

Se vi fondis familion, sanktigu ĝin por la benoj de amo kaj lumo, eĉ se tio kostos al vi aflikton kaj sinoferon.

Ne maltrankviliĝu pro neatenditaj ŝanĝoj, nek konsterniĝu pro la ŝajna venko de tiuj, kiuj sin donas al multoblaj interesoj escepte de tiuj ilin mem koncernantaj.

Konsideru la Viglan Rigardon de la Dia Providenco, kiu observas ĉiujn niajn paŝojn.

Memoru, ke, kie ajn vi troviĝas, vi vivas pro decido de la Plej Alta Povo direktanta niajn destinojn, tial ni konservu fidelecon al la devoj nin koncernantaj. Kaj klopodante senĉese por la disvastigado de bono sur tiu batalkampo, kiun al ni konfidis la vivo, ni atendu de la Leĝo novajn decidojn rilatajn al ni, ĉar la Leĝo mem levos nin al pli alta nivelo kaj glorigos al ni la penadojn en la oportuna momento.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 115.)**

## Ni faru la bonon

( MATEO, 25 : 40.)

Ne nur per la vortoj, kiuj povas simboli brilajn foliojn sur sterila trunko.

Ne nur per la ago kredi, kiu kelkfoje prezentas nenion alian ol senutilan ekstazon.

Ne nur per la titoloj, kiuj en multaj okazoj kondukas al ekscesoj.

Ne nur per la esprimoj de fido, ĉar multfoje la sonoraj frazoj estas krioj de malplena animo.

Ni ne forgesu la agon "fari".

La ligiĝo kun la Kristo, la komunikiĝo kun la Dia Lumo, ne dependas de la maniero interpreti la ĉielajn revelaciojn.

En ĉiuj cirkonstancoj de sia apostolado de amo, Jesuo klopodis atentigi la homojn ne pri la formo de la religia penso sed ja pri la homa boneco.

La Bona Novaĵo ne promesis la pacon de la supera vivo al tiuj, kiuj kaligus la genuojn en nekompreneblaj pentoferoj, kiuj spekulativus pri la naturo de Dio, kiuj anticipe pridiskutus la ĉielajn aferojn, aŭ kiuj simple predikus la eternajn veraĵojn. La Bona Novaĵo glorigis la subliman pozicion de ĉiuj, kiuj dissemus la amon en la nomo de la Ĉiokompatema.

Jesuo havis nenion kun tiuj, kiuj batalus en lia nomo, kiuj humiligus aliajn pretekstante lin glorigi, aŭ kiuj al li oferus spektaklan kulton

en temploj el oro kaj ŝtono. Jesuo kontraŭe asertis, ke la plej malgranda bonfaro, plenumita en lia nomo, estos ĉiam rigardata, en la Supro, kiel amofero farita al li mem.

EMMANUEL

**( Mediume skribis F. C. Xavier, el la libro "Viva Fonto", ĉapitro 137.)**